



2*88·125·

STARTO

ORGANO DE
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



FOTO-KRONIKO

① Fervojistoj-esperantistoj faris ekskurson sur la monton Ostrva en Altaj Tatroj.

② Partoprenantoj de HER '87 antaŭ la domo de kulturigo en Quedlinburg.

③ ④ ⑤

Bildoj pri ekspozicioj de pentraĵoj en Vyškov.



① _____



② _____



③ _____ ④



⑤

LA UNUAJ SEMAJNOJ DE PACO _____

Ne trompebla signo de paco estis silento. Ĝi trafis ĉiujn kaj post ses jaroj de milita tondrado ĝi estis preskaŭ nekredebla. La unuaj minutoj de silento apartenis al ĉiuj falintoj kaj mortigitoj. La homajn viktimojn de la dua mondmilito oni taksas je 50 ĝis 55 milionoj da personoj. El tio sur la frontoj falis 32 milionoj da soldatoj, en la koncentrejoj, en malliberejoj kaj sur la ekzekutejoj pereis 11 ĝis 13 milionoj da arestuloj. Restajn milionojn oni kalkulas je la konto de faŝista murdado en okupitaj landoj, je oferoj de malsato, epidemioj, aviadila bombardado ktp. Ĉirkaŭ 35 milionoj da personoj estis vunditaj, daŭre kripligitaj kaj fariĝis invalidoj.

La plej grandan perdon havis Sovetunio. En bataloj kontraŭ agresoroj finis la vivon 20 milionoj de ĝiaj civitanoj. Per militaj operacoj kaj efektiviĝado de naciisma politiko de forbruligita tero estis sur la teritorio de Sovetunio detruitaj 1 710 urboj, pli ol 70 000 vilaĝoj kaj forbruligitaj aŭ detruitaj 6 milionoj da lagdomoj kaj konstruaĵoj. Hitleranoj tute ruinigis 31 850 industriajn entreprenojn kaj forrabis 98 000 kolĥozojn. La tuta sumo de militaj damaĝoj faris 679 miliardojn da rubloj. Por tiu astronomia kvanto oni povus konstrui 1 300 industriajn kompleksojn de tipo de metalurgia kombinato en Magnitogorsk. Tiuj ĉi koncizaj ciferoj ne povas esprimi kompreneble grandecon de la homa suferado, la maron de sango kaj mizero ...

Neniu ankaŭ kapablas, nur kun escepto de arta literaturo, elvoki en plena amplekso la sentojn de ĝojo, feliĉo, atendado, espero kaj timoj, kiuj ekregis la plejparton de homoj en la unuaj pacaj tagoj. Ili antaŭ ĉio volis vivi kaj evidente verŝajne ne tro cerbumadis pri la estontaj malfacilaĵoj. Ili ne kredis pri la ebleco de nova milito, kaj la facilrompan pacon ili konsideris definitiva. Tio estis natura kaj komprenebla.

La hodiaŭa historiisto scias, ke jam en la antaŭfino de la milito inter Sovetunio, Granda Britio kaj Usono elkreskis gravaj konfliktoj, kiuj dum la tempo plue kreskis. La faŝista danĝero unuigis

tiujn tri potencojn, kies social-ekonomia strukturo, ideologia superkonstruo, tradicioj kaj interesoĵ diametre diferencis kaj kies imagoj pri la postmilita aranĝo estis pro tiu kaŭzo tute kontraŭaj.

Estas sendube, ke la plej dinamika elemento de la Granda Trio estis Sovetunio, kiu portis la ĉefan pezon de la bataloj kaj atingis la plej grandajn sukcesojn. Ĝi penis ne nur pri decida venko super la faŝisma bloko kaj liberigo de subjugitaj nacioj, sed ankaŭ pri kreo de fundamentoj de postmilita kunlaboro kaj amikeco. La soveta registaro proklamis jam la 24-an de septembro 1941 la respekton de suverenaj rajtoj de nacioj, rajtoj de nacioj je memdestino, je ŝtata sendependeco kaj teritoria netuŝebleco kaj de la propra elekto de la socia sistemo.

/ Laŭ V. Nálevka tradukis Zd. Mrowca/



lingva angulo

Ankoraŭ pri la abundeco kaj redundeco.

En la 5-a n-ro de Starto 1987 ni aperigis artikolon "Kontraŭ abundeco kaj redundeco" de s-ano Adolf Staŭura, prezidanto de la Lingva komisiono de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Al tiu ĉi artikolo s-ano Josef Rumlér sendis al ni leteron, el kiu ni prenas jenon:

"Tamen mi ne povas polemiki kun s-ro Staŭura, kiam li argumentas kiel prezidanto de la lingva komisiono per tio, ke mi estas "nepra komencanto". Li ja scias, ke la simile opiniantaj Piĉ kaj Urbanová kaj pluaj nepraj komencantoj ne estas. Mi ne scias, ĉu Piĉ estas "psikopato", sed mi scias, ke li estas membro de Akademio de Esperanto same kiel Urbanová. Kaj tio ja estas ankaŭ argumento. S-ro Staŭura estas tre naiva, li ne konas kaj ne komprenas la fundamentajn lingvistikajn leĝojn. Se li skribas "Kontraŭ abundeco kaj redundeco" (estas karakterize, ke ne sufiĉas al li abundo kaj redundo), do mi permesas al mi citi el la n-ro 7-8 de la revuo Esperanto el artikolo de lingvistika profesoro Aleksandro D. Duličenko ĉe la universitato de Tartu en Estonio (Sovet-unio): "Esperanto montris, ke ekz. la dekomence deklarita principo "unu vorto - unu signifo" estas plene nerealigebla, ĉar aktiva "viva" funkciado de lingvo postulas multsignifon de vortoj, evoluon de sinonimeco, pli heterogenajn esprimformojn de antonimaj rilatoj ktp., t.e. por Esperanto kiel ankaŭ por ĉiu etna lingvo necesas ne nur principo de lingva sufiĉo, sed ankaŭ principo de lingva superfluo. Pri tio skri-

bis jam en 1931 la konata soveta interlingvisto Ernest Drezen en sia verko Skizoj pri teorio de Esperanto." Tion la citaĵo. Kaj tion tiu nepre komencanto Rumler scias kaj dank' al tio li estas aŭtoro de Lasta ĉevalo ktp. Kaj tion s-ro Stanura ne scias kaj ĝis nun ne komprenas kaj tial li naive "kritikas". Li devus pli bone trastudi Kalocsay-on (almenau). Kaj iun enkondukon en la lingvostudadon."

Akademiano Eli Urbanová anstataŭ leteron sendis "ĉiam aktualan fragmenton" el Lingvo. Stilo. Formo de K. Kalocsay el la jaro 1931. Legu:

"La alia vojo estas pligrandigo de la Esperanta vorttrezoro, la tiel nomataj neologismoj. Tre delikata temo!

Rilate ilin la esperantistojn oni povas dividi en du grupojn, en propagandistojn kaj literaturistojn.

La propagandisto volas facilan Esperanton, kiun li povus versi rapide, per tute eta funelo, en la kapon de ĉiu homo. Li estus plej feliĉa, se la lingvo konsistus el ducent vortoj, se oni povus skribi sur poŝtkarton la tutan gramatikon, kaj la tutan vortaron, kun la Himno. Li estus tre kontenta, se post sessemajna kurso ĉiu parolus flue kaj komprenus sen vortaro la kolektivajn verkojn de Shakespeare, Dickens, Wells kaj Shaw.

La literaturisto volas riĉan lingvon, volas havi apartan vorton por ĉiu vorto de sia nacia lingvo, apartan vorton por ĉiu nuanco, laŭeble radikvorton, ĉar la vortojn tro derivitajn kaj kunmetitajn li sentas artefaritajn, malfortajn, senkolorajn. La poeto volas multajn, tre multajn vortojn, por raketi per ili, por trovi per ili freŝajn, neuzitajn rimojn. La poemtradukisto abonemas la kunmetaĵojn, ĉar ili estas tro longaj, malhelpas lin en lia vetkuro por mallongo. Ili efektive havas spiron je la tuta indogermana vorttrezoro kaj amare envias la kvardek mil vortojn de la feliĉa Shakespeare.

Tiuj du atipodoj, vere, akre batalas inter si, de kiam ekzistas la lingvo. La unuaj riproĉas, ke la neologismoj malfaciligas, konfuza, kaj fine pereigos la lingvon, argumentas per la orientanoj, kiuj ne konas la vortojn pruntitajn el la Eŭropaj lingvoj. La duaj riproĉas, ke la konservativa partio volas ŝtonigi la lingvon, bari ĝian evoluon, trudi al ĝi malriĉon kaj senornaman simplecon.

Kiel oni povus decidi en ĉi tiu kverelo, por doni pravon al ambaŭ partioj? Ĉar finfine, el siaj propraj vidpunktoj, ili ja ambaŭ estas pravaj.

Se la esperantistoj estas pri io en embaraso, ili plej ĝuste agas, turnante sin al la ekzemplo de la Majstro. Ni regardu do, kiel li, certe la plej grandskala propagandisto kaj literaturisto en la sama persono, solvis ĉi tiun dilemon?

Lia solvo ja estas konata. Li donis la trunkon de la lingvo en la Universala Vortaro de la Fundamento. Per tio li fiksas la vortprovizon vulgaran, kiel eble plej striktan, sed nepre necesan por ĉiu esperantisto. Kaj poste, tiel trankviliginte pri la unueco kaj neŝanĝebleco de la lingvokerno, kiel literaturisto li tute ne avaris pri la kreo kaj liberala akcepto de novaj radikoj, tiel ke la Zamenhofs radikaro de Wäster enhavas proksimume du milojn da ili, ĝis nun ne oficialigitajn.

Jen ekzemple kelkaj zamenhofaj, ne fundamentaj vortoj, kiujn ne

naskis nepre neceso, per kiuj la Majstro volis nur eviti kummetaĵojn kaj derivaĵojn. Abismo anstataŭ profundegaĵo, ferio anstataŭ liber-tempo, giganto anst. grandegulo, kalva anst. senhara, festono anst. florplektaĵo, karambolo anst. korpremiteco, aŭroro anst. tagiĝo, sino anst. trunkantaŭo.

Poste, jam ĉe Zamenhof, sed ankoraŭ plie ĉe Grabowski, oni vidas certan tendencon por la iompostioma malpliigo de la malvortoj. Ĉe Z. stulta anst. malsprita, aflikti anst. malĝojigi, milda anst. malsovaĝa, ĉe Grabowski humida anst. malseka, aperti anst. malfermi, disipi anst. malŝpari, noci anst. malutili, fora anst. malproksima, neglekti anst. malzorgi montras ekzemple ĉi tiun tendencon.

Oni do devas ne miri, ke tiuj tendencoj daŭras plu en la lingvo, kaj aperas stumbli anst. falpuŝiĝi, langvoro anst. animalstreĉiĝo, nupto anst. geiĝo, svelta anst. gracitalia, rara anst. malofta, audaca anst. riskemege eĉ lastatempe, trista anst. malĝoja."

Do tiel Kalocsay en la jaro 1931!

Ankoraŭ "Kontraŭ abundeco kaj redundeco".

En Starto 5/87 aperis mia artikolo kun tiu titolo. La redaktoro presigis antaŭ ĝin la vortojn de Jiří Karen "Tradukado kaj ĝia reala bazo - vortaroj", en kiu la aŭtoro asertas, ke Josef Rumler bazas sian verkon sur "Neologisma glosaro" fare de Henri Vatré, Gaston Waringhien kaj Reinhard Hauptenthal. Laŭ la vortoj de Karen la vortaro aperis jam en la j. 1983. Rumler mem mencias eĉ ne unu vorton pri tiu verko en sia broŝuro kaj li diras nur tion, kion mi reskribis de li en mia artikolo. Ripete: "En mia sinonima vortareto temas precipe pri kontribuaĵoj de tri aŭtoroj: ab Karel Pič, of Josef Rumler kaj far Eli Urbanová." Rumler do pruntas la pavajn plumojn. El la tri, fare de karen indikitaj aŭtoroj de la glosaro, Rumler mencias nur Vatré-on en la frazo, kiun mi citis ĉe fino de la antaŭlasta alineo sur p. 9. Denove eĉ ne unu vorto pri kunaŭtoro de la "Neologisma glosaro". Cetere, mi legis malaprobajn vortojn pri R. Hauptenthal. Li tradukis la romanon "La suferoj de la juna Werther" de Goethe. Klaus Schubert /Nederlando/ en la UEA-revuo "Esperanto", junio 1987, recenzante tiun ĉi libron, diras nenion pri la glosaro, sed parolas nur malfavore pri imitado laŭ Pič. Denove do neniu apogo por "Rumleranto". Mi timas, ke pri la aŭtoroj de tiu vortaro oni povus ripeti tion, kion ĝiris ekz. d-ro Blanke aŭ R. Sulco pri K. Pič. Kaj mi legis ankoraŭ pluajn malfavorajn menciojn pri Pič de aliaj aŭtoroj en la tempo, post kiam mi skribis mian artikolon, tio estis en marto 1987 /ĝi venis en manojn de legantoj nur en januaro 1988/. Ŝajnas do, laŭ eldiroj de Rumler, ke ekzistas rekta konekseco inter Pič kaj la "Neologisma glosaro".

En la kolofono de Starto 5/1987 oni legas ĉefie: "Transdonita al presejo 15. 8. 1987." Post unu monato okazis nia Kongreso en Olomouc. Antaŭ la mikrofonon venis - inter multaj aliaj - ankaŭ la redaktoro de la Ĉs. numero de Paco, ing. Margit Turková, kiu deklaris en nomo de J. Karen, prezidanto de la Literatura-arta sekcio /li ne ĉeestis/, ke li rezignas pri la neologismoj. Kun granda intereso mi atendas Pacon 1987, en kiu karen kunlaboras, kion mi en ĝi trovas fare de li. kaj ankaŭ mi sciemas, kiel li klarigos al legantoj de Starto la ŝanĝon de sia vidpunkto.

Januaro 1988.

Adolf Staňura

FERVOJISTA SEKCIO

JARKUNVENO DE FS ĈEA

Komence de oktobro jam tradicie jarkunvenas Forvoĵista Sekcio de ĈEA. La ĉijara, jam 21-a jarkonferenco, okazis en tagoj de la 2-a ĝis la 4-a de oktobro 1987 en slovakia urbo Poprad kaj krom la ĉefaj kaj slovakaj fervoĵistaj esperantistoj partoprenis ĝin invitataj gastoj kaj delegatoj el Aŭstrio, Bulgario, Jugoslavio, GDR, Hungario kaj Pollando.

Vendrede posttagmeze ni unue komune vizitis la fervojan stacion Poprad - Vysoké Tatry, kie ni sub ĉiĉeronado de la staciestro ing. Stanko Ladislav interkonatigis kun nova stacidomo konstruita en la unua etapo de rekonstruado de fervoja stacio Poprad - Vysoké Tatry. Rekonstruado de la tuta stacio okazas en ses etapoj. Ties unua etapo, konstruado de la nova stacidomo jam estas preta kaj kostis 180 milionojn da kronoj.

Vespere post komuna vespermanĝo okazis labora parto de la jarkonferenco. Krom la jam menciitaj eksterlandaj delegitoj kaj gastoj partoprenis kiel gastoj ankaŭ nova prezidanto ĈEA ing. Petr Chrdle kaj ing. Milan Zvara kiel reprezentanto de Slovaka Esperanto-Asocio. Post inaŭguro ing. Chrdle tralegis leteron de la IFEF-prezidanto Joachim Giessner, kiu ne povis alveturi por persone ĉeesti. Poste prezidanto de la sekcio František Strumínský raportis pri la tutjara agado de la sekcio. La membraro kreskis nur iomete. Oni okazigis krom alia sukcesan aprilan amazvesperon en Praha, grupe partoprenis la ĉijaran IFEF-kongreson en Katowice, iuj membroj partoprenis diversajn renkontigojn enlande kaj en najbaraj socialismaj landoj, precipe en GDR, Hungario kaj Pollando. Laboro de la terminara komisiono ne progresis dum lasta jaro tiomgrade, kiom oni esperis. Oni decidis pliaktivigi laboron de TK krom alia per akcepto de du novaj fake spertaj kunlaborantoj. Plibonigis laboro de la informa komisiono. En gazetoj Internacia Fervoĵisto, Starto, Esperantisto Slovaka, DEFA-bulteno kaj en neesperantaj fakaj gazetoj Železničář /La Fervoĵisto/, Trať družby /La linio de amikeco/, Jihomoravský železničář /La Sudmoravia Fervoĵisto/ kaj aliaj aperis dum lasta fervoĵista jaro sume 62 artikoloj, informoj kaj tradukoj pri Esperanto aŭ pere de Esperanto. La financa situacio de la sekcio kompare kun lasta jaro plibonigis, la subkonto de ĈEA nun estas pozitiva. Prezidanto Strumínský dankis al ing. Petr Chrdle pro lia oferema laboro por FS en funkcio de vicprezidanto, kiun li bedaŭrinde pro sia elektigo kiel prezidanto de ĈEA jam ne povos plu daŭrigi. Poste por kompletigi la komitaton de FS oni elektis tri novajn komitatanojn ing. Jaroslav Černý, Jitka Skalická kaj Alois Klumpar. Reprezentantoj de ĉiuj supre nomitaj landoj salutis la jarkonferencon, mallonge raportante pri la agado de siaj sekcioj ĉe partoprenante en la poste okazinta vigla diskutado.

Sabate okazis ekskurso al montaro Altaj Tatroj. Post vendreda vespera pluvo kaj negado enmontara invitis nin sabate matene bela aŭtuna mateno kun sunradioj, strebantaj degeligi la falintan neĝon en montaro. Post komuna veturo el Poprad al Štrbské Pleso per elektra trajno de Tatramontara Elektra Fervojo, pri kies pli ol sepdekjara historio kaj nuntempo ni estis informitaj per ricevitaĵ materialoj, ni en Štrbské Pleso faris tri grupojn laŭ fizika kapablo de partoprenantoj. La plej kapablaj /kune sep- kaj sesjara filinoj de unu el partoprenantoj/ marŝis el Štrbské Pleso laŭ Tatramontara Magistralo al Popradské Pleso, de kie post manĝado kaj refreŝigo ni grimpis sur monton Ostrva kaj de tie plu al Batizovské Pleso kaj Slezský dům al Starý Smokovec, de kie ni daŭrigis la vojon per elektra trajno reen al Poprad. Ankaŭ aliaj du grupoj estis kontentaj kun ekskurso tra montaro, ĝisate spirante la freŝan montaran aeron kaj interkonatiĝante kun belega tatramontara naturo.

Post komuna vespermanĝo en stacidoma restoracio oni ĝis malfruj vesperaj horoj amuzis sin en la sidejo de Slovaka E-Asocio.

Programon de la jarkonferenco daŭrigis dimanĉe antaŭtagmeze komuna promeno tra historia parto de Poprad, precipe tra urba parto Spišská Sobotka, en 1954 proklamita kiel urba rezervejo. Historie valoraj tiuj estas fasadoj de pluraj historiaj urbaj domoj kun stukornamajoj. Sed la plej valora en tiu ĉi urboparto estas preĝejo de sankta Juraj kaj en ĝi troviĝantaj malfrugotikaj flankaltaroj kaj apude situanta renesanca sonorilturo el jaro 1598.

Sed Poprad, tio estas ne nur historiaj konstruaĵoj, Poprad kun siaj preskaŭ 50 000 loĝantoj estas la tria laŭ grandeco urbo en Orientslovakia regiono. Dank al sia bela situo inter montetoj kaj bona trafika kunligo /fervoja kaj aŭtobusa stacioj, aviadejo/ ĉi tien alvenas multaj gastoj por poste ferii aŭ almenaŭ viziti montaron Altaj Tatroj, orientan parton de Malaltaj Tatroj aŭ Zamagurie.

En la urbo estas mencienda maŝinfabrika kaj nutraĵa industrioj. Al la plej gravaj entreprenoj apartenas Vagonejo, kie oni fabrikas fervojjajn varvagonojn, kaj Tatramat, la entrepreno konata per fabrikado de aŭtomataj levmaŝinoj kaj elektraĵ akvovarmigiloj. Por la kreskanta loĝantaro oni konstruis kaj konstruas novajn modernajn loĝkvartalojn. La urbo nuntempe evoluas en karakterize modernan socialisman urbon.

Kontentaj kaj kun multaj rememoroj pri belaj travivaĵoj en amika rondo kaj en belega tatramontara naturo forveturadis partoprenantoj de la jarkunveno dimanĉe posttagmeze kaj vespere al siaj hejmoj, al sia ĉiutaga laboro.

Jindřich Tomášek

Bernard Golden

En la revuo Esperantista /Prago, 1946, n-ro 3/ Jaroslav Mařík aperigis interesan informon pri ekzemplo de denaska esperantismo. Mi citos ĉi-sube el la resumo, kiun li sendis al mi.

En la jaro 1945 vizitis la Esperantistan klubon en Praha oficiro de la usona armeo, s-ano Kóvary. Ni sciigis, ke antaŭ la milito la familio de la fervora esperantisto, noblakora judo /epiteto aldonita de redaktoro S. Kamaryt/, Julio Kóvary loĝis en Bratislava /Ĉeĥoslovakio/. La geedzoj estis malsamnacianoj, unu ne sciis la lingvon de la alia, sekve ili interparolis sole en esperanto. Tiel la internacia lingvo fariĝis gepatra lingvo de la infanoj. La slovakano ili ellernis de siaj ludkamaradoj.

En la lerneja studatesto estas rubriko "La gepatra lingvo". La lernejestro tre hezitis enskribi tien "esperanto", sed devis tion fari post klarigo kaj interveno de la gepatroj. Tio estis en la jaroj 1922-28. Post la hitlera okupacio la familio sukcesis transmigrigi en Usonon /New York/.

Laŭ mia scio, tio ĉi estis la unusola kazo, ke esperanto estis oficiale rekonita kiel lingvo gepatra.

Ĉar mi esperantistigis en Nov-Jork kaj konis la esperantistojn aktivajn en tiu urbo post la dua mondmilito, s-ro Mařík sendis la cititan tekston al mi kun la demando, ĉu eble mi konas s-ron Kóvary. Mi respondis, ke mi neniam renkontiĝis kun li kaj eĉ ne memoras tiun nomon. Povas esti, ke Julio Kóvary ne ĉeestis kunvenojn de la novjorkaj esperantistoj tiutempe, ĉar li ankoraŭ postenis kiel armea oficiro en Europo aŭ aliloke.

Lastatempe mi komencis meti ordon en mia hejma biblioteko post translogiĝo kaj retrovis valoran publikigaĵon, enhavantan informojn pri amerikaj esperantistoj. La sekva biografia skizo pri la patro de Julio Kóvary kompletigas la priskribon de la familio, kiun s-ro Mařík prezentis en sia informo.

180. KOVARY, Olivio
355 E. 187th St.
New York City 57

1. Komencis lerni E. 1900 estinte 10 jara knabo en klaso kies instruistino sciis E. kaj senpage donadis E. lecionojn al dezi-rantaj infanoj.
2. En 1918 edzigis kaj esperantigis sian junan edzinon; ŝi lernis bone E. dum 3 monatoj. Parolis al siaj infanoj E. ekde ilia nasko, tial E. estas ilia patro lingvo. Ĉeestis Vianan Universalan Kongreson 1924 kaj poste plurajn aliajn. Dum tiuj kongresoj oni sukcese uzis la E-parolantajn infanojn por propagando de E.

3. Nask. 1890. Profesio peltisto. Alvenis el Eratislava, Ĉeĥoslovakujo. Edzino fervora E-ino. Ambaŭ parolas kaj skribas Esperante, Hungare, Germane, Slovake, Ĉeĥe. Esperanto helpis lerni Francan kaj Anglan lingvojn. /Citaĵo de la teksto sur pĝ. 47 de: Kiu estas kiu inter nord-amerikaj esperantistoj.
Dua eldono 1947-48. Ĉefredaktita de F.A. Postnikov.
Little Rock, Arkansas, Usono: "Espero"; 1948, 96 pĝ./

Rimarku, ke en la usonangla ortografio la "8" en K8vary fariĝis "o". Plua esplorado surloke en Nov-Jorko estas bezonata por akiri pli da donitaĵoj pri la sorto de la denaske parolantaj esperantistoj de la familio K8vary.



Dank' al k-do Nikola Aleksiev mi havis eblecon ekscii pri la recenzo por mia verko "Progresemaĵoj Momentoj en la Ideologio de L.L.Zamenhof", presita en "Starto", N-ro 2, 1987, p.11. Mi kore dankas al k-do Adolf Staŭra, pro la recenzo ĝenerale kaj konkrete pro la montrita manko de akuzativo, p. 58.

Bedaŭrinde pri la ceteraj kvar"eraroj" mi devas doni kelkan eksplikon:

- a/ En la verko "Lingvaj Respondoj", de L.L.Z., eldono 1962, p. 57 estas presita Zamenhof-respondo precize pri la divido de vorto por transportado de unu linio al alia. La problemo estas neprincipa, sed teknika. La ordinaraĵoj laboristoj-esperantistoj ne povas sukcese ellerni la konsilojn en la Analiza Gramatiko, kiuj estas nur imitaĵo el naciaj lingvoj.
- b/ La unua esperantista organo havis titolon "La Esperantisto" nur dum la jarkolektoj I kaj II /1889-1891/, sed poste la titolo estis mallongigita je "Esperantisto". En p. 6 mi parolas pri gazeto "Esperantisto" /1892-1895/, tial "la" ne devas esti majuskuligita.
- c/ Nur antaŭ nelonge la Esperanta Akademio oficialigis la malsimplan prepozicion "fare de" kaj kondamnis severe "far". Do en 1985 mi preferis la oficialan prepozicion "kontraŭ" des pli ĉar en nia kazo estas pli taŭga. La esprimo "ekspluatado de homo kontraŭ /la/ homo" enhavas cent-elcentan antagonismon de kapitalismo. La prepozicio "fare de" ankau povas esti uzita en tiu kazo, sed tiam ĝi estis neoficiala kaj krom tio estas malpli forta, estas malpli elokventa ol la oficiala prepozicio "kontraŭ".
- ĉ/ En p. 6 "eldonanto" ne estas mise uzita. Per la propono anstataŭ "eldonanto" ke oni uzu "eldonado"n oni nur kreas alian nuancon de la sama penso, sed tiu lasta estas malpli elokventa.
- Al la esperantista organo "Starto" mi deziras grandan prosperon en la dua jarcento de Esperanto, komenciginta ekde la fino de julio 1987.

En Sofio, Bulgario, la 5-an de Sept. 1987

Kun sinceraj salutoj

Canko Murzin

Efektive okazis

ESPERANTISTO - MEMLERNANTO

La historio okazis antaŭ kelkaj jaroj. Beograda esperantisto Milan Lakič - laŭ li komencanto - hazarde trovis mian adreson kaj kuraĝe sendis al mi unuan leteron. Mi - volante teni kaj apogi novan adepton - respondis al li. Poste sekvis pluaj reciprokaj leteroj. En mia lasta letero mi menciis, ke somere mi vizitos istrian urbon Medulin, sed Beogradon pro la malproksimeco de la maro mi ne planas viziti. Kaj la ĉefa kaŭzo estas ankaŭ malmulto da mono. Kia estis mia surprizo, kiam post la alveno al Medulin, nia gastigantino raportis al mi, ke poŝtoficejo tenas por mi 2 000 dinarojn senditajn el Beogrado. En tiu tempo kostis unu dinaro Kĉs 3,-. Ege ĝojigis min la fido de Milan, tamen ni ne konis nin reciproke persone kaj instersanĝis kune nur 5 - 6 leterojn. Mi tuj estiĝis riĉa turisto.

Tion nur por la enkonduko. La celo de mia rakonto estas tute alia. Revenante hejmen de la maro mi kun mia edzino haltis en Beogrado por danki kaj redoni al li restantan monon. Sed lian adreson mi lasis hejme, ĉar ni ne antaŭvidis viziti lin. Nur mi sciis, ke li laboras kiel tapetisto ie en la urba entrepreno en iu trafikremizo. Mia laca edzino sidigis sur la benko antaŭ stacidomo, rifuzante iri kun mi serĉi Milan. Mi ekpaŝis mem kaj post 3 horoj mi fine trafis la veran remizon. Pordisto montris al mi lian laborejon kaj ni fine renkontiĝis. Milan tuj prezentis min al sia estro, kiu kompleze liberigis lin, ke li povu akompani min. Dum la tempo, kiam li lavis sin kaj ŝanĝis la laborveston, ni reciproke babilis. Poste ni prenis lian aŭtomobilon kaj veturis por mia edzino. Ankaŭ dum la veturo ni senĉese babilis. Subite li direktis la aŭtomobilon al trotuaro, kie li haltis kaj silentis. Komprenoble mi demandis, ĉu okazis io malagrabla. Li rigardante min respondis: "Ĉu vi komprenas al mi bone?" "Memkomprenoble" diris mi, "tamen ni babilas kune pli ol duonhoron". Tute ŝokite li rakontis al mi: "Kredu min, hodiaŭ mi unuafoje parolas esperante kaj mi komprenas al vi kaj vi al mi. Mi estas memler-

nanto, Esperanton mi lernas nur 4 monatojn, ĝis nun mi ankoraŭ neniam parolis, nur mi multe legas. Ĝis nun mi estas nenie organizita". Post momento ni daŭrigis la veturon. Dum la veturo mi klarigis al li, malgraŭ tio, ke li bone parolas esperante, li ne estas ankoraŭ esperantisto, tiel, kiel li ne estas franco, kvankam li perfekte regas la francan. Esperantisto li ekestos tiam, kiam li estos organizata kaj komencos labori por la movado kaj batali por la ideo. Mian klarigon li ĝisvorte akceptis kaj estigis poste fidele propagandisto de nia lingvo. Lian komplezon mi rekompencis al lia familio, kiam ili vizitis Pragon. Bedaŭrinde ĝi estis lia lasta vizito, ĉar post du jaroj li mortis kaj mi perdis bonkoran amikon.

Jaroslav Šperling

Rondeta vivo



BRNO

La tradicia amika triurba renkontigo Brno-Bratislavo-Budapesto fare de Esperantista Klubo en Brno okazis dum la tagoj 2.-4. 10. 1987 en la bela regiono de Moravia Karsto en Blansko-Češkovice kun partopreno de pli ol 50 personoj. La ekskurs-programo estis tre rica: Punkva-grotoj, grotoj Balcarka, kastelo en Rájec n.Svit. kaj Naturscienca Muzeo en Blansko. En la programo de la artvespero estis koncerto sub gvido kaj ankaŭ aktiva partopreno de prof. H. Halířová kaj pluaĵ artistoj de Stata Teatro en Brno (soloj, dutetoj, baletoj). Vere memorinda renkontigo, la partoprenintoj estis maksimume kontentaj pro la modela organizita laboro farita de s-anino J. Burianová. J.V.

HAVÍŘOV

En la monato de cs.-soveta amikeco rakontis M. Pastrnák pri sia restado en Leningrado kaj prezentis belajn diapozitivojn pri tiu urbo-heroo. - En metilernejo de Bánské stavby okazis E-a ekspozicio, transportita el Kulturdomo kaj pretigita fare de Zd. Heiser, kiu ankaŭ

gvidas E-kurson por 20 lernantoj 11-15-jaraj en la elementa lernejo. - Ekde decembro 1987 nia grupo kunvenadas en nova, antaŭ monato finkonstruita Kulturdomo Leoš Janáček. S-anoj Zd. Heiser kaj B. Grym rakontis je la 17a de dec. pri siaj travivaĵoj dum la varsovia kongreso kaj M. Pastrnák informis pri nova organizo de ĈEA. - Jarkunveno de la E-rondeto okazis 14. I. 1988. Estis prezentita raporto pri vigla agado de la pasinta jaro kaj aprobita plano de arangoj por la unua jaro de la dua jarcento de Esperanto. Ekzistas bonaj premisoj por sukcesa plua funkciado de la rondeto, dank' al diligentaj funkciuloj, precipe Zd. Heiser kaj prof. Mil. Pastrnák kun lia filino. La ĉeestantoj povis vidi novjarajn bondezirojn, kiujn ricevis Jarmila Pastrnáková k. a. el ciuj mondpartoj. S-anoj Pastrnák kaj Heiser surbendigis por niaj du nevidantaj membroj la vortaron de Hromada. La kunvenejo en la nova Kulturdomo Leoš Janáček estas tre konvena, kvankam ekster la centro de la urbo /haltejo de autobusoj 4 kaj 5/.

A.St.

JABLONEC NAD NISOU

Klubo en Jablonec kunvenas regule ĉiam lunde inter la 19-a kaj 21-a horo en propra klubejo apud la urba teatro en "Dům vzdělávání KaSS" - 3a etago.

Post la vico de jam tradiciaj pacmarsoj oni arangos sabato la 23-an de aprilo 1988 Printempan Esperantistan Pacan Renkontigon en kabano Nad Prosečí.

En la distrikto de Jablonec fondiĝis nova klubo en urbo Železný Brod.

L I B E R E C

Centjarigo de Esperanto estas ankaŭ bona sanco, kiel disvastigi ideon de Internacia lingvo inter vasta publiko. Certo sukcesis en Liberec, kie loka Esperantista klubo kunigis siajn fortojn kun Ŝtata teatro de F. X. Šalda kaj Klubo de amikoj de Libereca opero.

En la lasta januara sabato okazis en tre bela medio de la teatro solena kanta matineo. Unue bonvenigis ĉiujn gastojn Lubomír Tlalka, la membro de la Ŝtata teatro, en tre bona Esperanto.

Kaj poste jam komencigis la cefa programo. S-ano Josef Vích, la membro de Nacia teatro en Prago, kaj s-ano Miroslav Smyčka, la membro de Ŝtata opero de Zdeněk Nejedlý en Ústí nad Labem prezentis elekton el Bibliaj kantoj de Antonín Dvořák, kelke da Vesperaj kantoj de la sama aŭtoro, la arion de Toreadoro el "Carmen" de Bizet kaj fine la arion de princo el opereto "Lando de ridetoj". Certe la plej aplaudata estis dueto de Kecal kaj Jeník el "Vendita fiancino" de Bedřich Smetana.

Post la esperanta parto kantis membroj de Ŝtata teatro de F.X.Šalda kaj membroj de Nacia teatro en Prago. Preskaŭ plena spektejo aŭdis la plej konatajn ariojn el ĉefaj kaj mondaj operoj.

Pri preparo de tiu ĉi arango ankaŭ informis la organo de regiona komitato de KPC Prŭboj kaj eĉ dufoje la organo de distrikta komitato de KPC Vpřed. Informo pri la matineo aperis ankaŭ en la tutstata ĵurnalo de KPC Rudé právo kaj raportojn el la matineo ankaŭ kelkfoje elsendis Ĉeĥoslovaka televido.

Libereca Esperantista klubo tre dankas al ĉiuj, kiuj venis kaj cefe al J.Vích kaj M. Smyčka pro la tre artoplena travivaĵo.

J.H.

NOVÝ BYDŽOV

Klubo de internacia amikeco de Berta Suttner arangis je la 30-a de novembro 1987 en Urba kulturcentro Nový Bydžov koncerton al 100-a datreveno de Esperanto. Sur la koncertejoj aktoris artistoj - esperantistoj J. Vích, operkantisto el Nacia teatro Praha, klarnetistino B. Šutrová, poeto J. Karen kaj profesoro de konservatorio J. Pícek. Rica belega programo. J.Petera

O L O M O U C

Patrujscienca muzea societo en Olomouc arangis 29.10.1987 en granda salono de loka regiona muzeo prelegvesperon je la temo "100 jaroj de Esperanto kaj 75 jaroj de Esperantista movado en Olomouc". Referatojn por ĝi preparis por la unua parto s-ano Ludvík Zaoral, por la dua s-ano D-ro Vladimír Mohapl kaj en la tria parto s-ano Vlastimil Blažek helpe de epidiaskopo prezentis gravajn dokumentojn pri tutstata kaj loka E-movado kun apartenantaj klarigoj. Ĉiuj tri prelegintoj estas membroj de speciala laborgrupo kreita en la menciita societo por historio de Esperanto-movado en Olomouc. Zaoral-Mohapl

P R A G O

En la jubilea jaro la Esperantista klubo en Prago konsiderinde plivigligis sian agadon. Pri la solena koncerto de E-lingvaj arioj kaj kantoj fare de operkantistoj el la Nacia teatro en Prago en septembro 1987 estis informo jam en la pasinta Starto.

Por festi la Centjarigon de Esperanto kaj samtempe la 85-jarigon de la klubo estis en Parko de Naděžda Krupská en la praga kvartalo Vršovice plantita memora arbo - tilio. La solena akto okazis la 16-an de novembro 1987 posttagmeze kaj ceestis ĝin cento da gesamideanoj el Prago kaj ankaŭ el aliaj lokoj. Ceestis ankaŭ la sekretario de ČEA K. Franc kaj reprezentanto de Asocio de Naturprotektantoj. Ĉi-jare estas ce la tilio starigota memorstono.

De la 23-a ĝis la 29-a de novembro 1987 en la klubejo en Vejvodova-strato okazis ekspozicio de fotografajoj kaj desegnaĵoj de gesperantistoj el Prago

kaj ankaŭ el aliaj urboj. La ekspozicion vizitis pli ol 400 homoj, inter ili ankaŭ japana studento studanta en FRG. Multaj vizitantoj acetis lernolibrojn, vortaretojn kaj aliajn E-materialojn.

En la sama ejo okazis ekspozicio de slojdoj de la 7-a ĝis la 13-a de decembro. Ekspoziciataj estis brodaĵoj, kroĉtrikaĵoj, trikvestoj kaj ankaŭ brácelatoj kaj kolieroj el ledo, ludiloj, sukeraĵoj k.a. kaj sendis ilin ges-anoj el Bohumin, Hradec Králové, Olomouc, Pardubice, Slavičín, Trutnov kaj Praha. Faka jurio aprezis la eksponaĵojn kaj atribuis premiojn al jenaj s-anoj: 1-an premion gajnis s. Čechová el Slavičín por la blanka, flave brodita kovrotuko, 2-an premion gajnis s.Pouchlá el Praha por la rice kaj bele brodita kovrotuko en harmoniaj koloroj, 3-an premion s. Ambrožová el Praha por la bela kaj sendifekte farita trikvesto en elegantaj koloroj.

La 22-an de novembro la Praga klubo aranĝis Fulmrapidan Ŝakturniron okaze de la jubileo. Partoprenis ankaŭ esperantisto el Berlino. Venkis s-ano Vávra el Prago.

Tre sukcesaj estis ankaŭ la Zamenhof-vespero, en kiu i.a. esperantajn poemojn laŭ siaj melodioj kantis Jan Pečený, kaj la Kristnaska vespero, dum kiu la klubo en Vršovice estis plena. Rican programon partoprenis kaj plenkreskuloj, kaj ankaŭ junularo, ekniaj etuloj. Sub la kristarbeto estis multaj donacetoj kaj la etoso estis gojplena. Křesinová-Pa.

P Ř Í B R A M

Esperanto-rondeto "Paco" de la Sindikata klubo de la Urnamejoj en Příbram estas daŭre favore taksata de sia patrono, kion atestas pluraj honorigoj. Nun, okaze de la Tago de la kulturlabornatoj ricevis prezidanto de la klubo s-ano Jaroslav Vácha honoran diplomon de la Distrikta nacia komitato por la longjara aktiva laboro por la interkomprenigo de la popoloj uze de la Internacia Lingvo. La honorigo okazis la 4-an de novembro 1987 en kastelo Dobříš, sidejo de la Sindikato de verkistoj, kaj al la bela kultura programo kontribuis ankaŭ L. Munzar, mer. artisto. M.Tur.

T Á B O R

Solena Esperanto-matineo okazis en Tábor la 27-an de septembro 1987. Solenan paroladon havis D-ro Fr. Rytíř, la E-himnon kantis horo Hlahol, horestro St. Pešička. En la arta programo partoprenis la Kamera blorkestro en Sezimovo Ústí, estro Zdeněk Prášek, kaj la kantohoro Hlahol. Oni prezentis verkojn de D. Bostock, J. I. Linek, H. L. Hassler, G. F. Händel, B. M. Černohorský, E. Suchon, H. Purcell, M. Locke k. a.

ÚSTÍ NAD LABEM

La rondeto aranĝis ekspozicion de la 20-a de septembro ĝis la 10. de oktobro 1987 en la ĉefa halo de la Domo de kulturo en Ústí n.L. - Por la Nacia memor-ejo en Lidice la rondeto preparis E-linĝvan sonbendon pri la tragedio de Lidice dum la fasista okupacio de Ĉeĥoslovakio. La programon surbendigis Věra kaj Vlastimil Novobilský. - La rondeto havas viglajn rilatojn kun la E-klubo en Ŝumen (Bulgario) kaj Gijon (Hispanio) kaj vigligas la rilatojn kun e-istoj en Pirna (GDR). - Per aparta letero kaj flugfolio la rondeto informis la ustajn entreprenojn kaj lernejojn pri la nova kurso de Esperanto por komencantoj. - La membroj de la rondeto havis vastan publikigan kaj prelegan aktivecon. S-ano J. Kříž aperigis artikolon pri la kurso de Esperanto en Sever, 1987-09-22. Poeto Jiří Kořínek tradukis poemojn el la ĉeĥa, kiuj aperis en: Fonto n-ro 73 (M. Procházková: La ventoj, Kiel vi estas fortempa), Fonto 74 (J. Karen: Arboj venas urben), Fonto 75 (M. Procházková: La universo en mi; J. Karen: Ŝtonoj, Atestas senarbejo), kontribuajfoj de J. Kořínek kaj Vl. Novobilský al Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo, prelegoj de V. Novobilský en la Interlingvistika seminario en Altaj Tatroj 1987-05-20/24. La 22-an de januaro 1987 elsendis radiostacio Ústí n.L. intervjuon de red. J. Mohaupt kun V. Novobilský pri la traduko de la usona lernolibro pri la ĝenerala, organika kaj biokemio en Esperanton, la 2-an de aprilo en la sama stacio informis pri Esperanto s-ano M. Smyčka kaj prezentis fragmenton el la E-traduko de Majo de K. H. Mácha.

PRAGA

FOTO-KRONIKO



①

1. Esperantistoj solene plantis memor-tilion en Prago.
2. La kluba prezidantino alŝovelas grundon.
3. La ekspozicio de slojdoj estis tre sukcesa.
- 4.-6. La premiitaj elfaraĵoj.

②



③



④



⑤



⑥

Fotoj: Ing. Khail,
J. Sperling
Ing. Veselý

La rondeto en Ŭstí n. L. aranĝis ankaŭ kelkajn koncertojn en la jaro 1987. la 27-an de septembro en la preĝejo de la ĉeĥoslovaka eklezio s-ano M. Smyčka kantis Bibliajn kantojn de A. Dvořák en la E-lingva traduko de J. Koříněk; la 8-an de oktobro okazis malgranda koncert-recitalo de Miroslav Smyčka; la 18-an de decembro en la Domo de kulturo en Ŭstí n. L. solenan koncerton okaze de la 100-a datreveno de Esperanto. Post la fest-parolado de V. Novobilský sekvis operarioj kaj kantoj en Esperanto en plenumo de Josef Vích, membro de Nacia teatro en Prago, kaj Miroslav Smyčka, membro de la Ŝtata teatro en Ŭstí n.L., pianakompanis dirigento de la Ŝtata teatro Michael Lorenc. La programon kompletigis kantado de kristnaskaj pastoroj en la traduko de J. Koříněk kaj socista programo de Václav Vanc jun. La koncerton partoprenis gastoj el GDR, s-ano Norbert Karbe el Pirna prezentis salutparoladon.

Vl. N.

V Í T K O V I C E

La kunvenoj de la klubo okazas ĉiusemajne, ĉiam merkredo de la 18.00 horo. Post fino de la oficiala parto de la kunveno sekvas de la 19.00 horo kurso por progresintoj kaj aliuloj povas libervole amuzigi ĝis la 21.00 horo. Ĉiam en la unua kaj tria merkredo de la monato la klubo aranĝas programon E-lingve. Pri aranĝotaj programoj informas estraro de la klubo siajn klubancjn per ĉirkulero, kiu de autuno 1987 nomigas "Kluba vivo".

- suR -

V Y Š K O V

Pri Vyškov dum la lastaj jaroj estis apenaŭ io aŭdebla inter esperantistaro. En la jubilea jaro ni volis revigligi la agadon de E-rondeto, kiu laboras sub Kunigita sindikata klubo. La ĉefa problemoj kaj tasko estis plinombrigo de anoj. Por ĝi povis helpi la cetera agado, kies celo estis propagandi kaj informi pri Esperanto kaj nia rondeto. La plej grava afero estis ekspozicio de infandeseĝnaĵoj sub la devizo "Pacon por la vivo, pacon por niaj ludoj". Post anonco en Budapeŝta Informilo venis por la ekspozicio entute 90 deseĝnaĵoj el Hispanio, Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Sovetunio.

Parto el ili estis ekspoziciita en kadre de ekspozicio de artilaboradoj de infanoj el distrikto Vyškov en la konkurso "Infanoj, paco, arto" en Distrikta domo de pioniroj kaj junularo, en junio. En oktobro kaj novembro estis instalita ekspozicio en la salono de Sindikata klubo. Tie okazis diversaj kunvenoj, danckurso por gejunuloj kaj aliaj, tiam la ekspozicion povis vidi multe da homoj. Plejparte partoprenis infangrupoj kaj en la leteroj, almetitaj de iliaj instruistoj, ni povas legi: "... La devizo de ka ekspozicio tre placas al la geartistetoj, ĉar ili konscias pri tio, ke la paco por iliaj ludoj gravas... Vi vidas, ke la infanoj revas pri suna ĉielo, pacaĵoj, pri granda hela lernejo... La temo de ekspozicio estas la plej aktuala en nia nuntempa mondo. Se homaro ne kuniĝos en lukto kontraŭ milita minaco, povas esti teruro..." Al ĉiuj infanoj estis senditaj dankleteroj kun bildkarto de urbo Vyškov.

Plua afero estis la establo de infanforma kesto. Ĝi situas sur placo de la majo. Ĝi povas efike helpi en la verbarado, precipe por kursoj. En oktobro komencigis kurso por komencantoj. La modelo de E-klubo Brno ni decidis organizi dum la jaro du kursojn 4-monatajn, tiam la kurso autuna finiĝas en januaro kaj en februaro komencigas la nova.

Ankaŭ la nombro de niaj anoj ni sukcesis plialtigi, relative je 50 %, la absolutan valoron ni prefere prisi-lentus. Sed se ni sukcesos tiel daurigi, nia rondeto kreskos al multnombra grupo. Nun ni bezonas ankoraŭ pli kapti la atenton de la publiko. Ing.J.Vojáček

Z N O J M O

Ekde la 1-a de oktobro instruas 14 infanojn s-ino instruistino J. Machovcová. La 15.10. prelegis pri UK en Varsovio V. Rotrekl, ĝia partopreninto. Partoprenis multaj esperantistoj kaj gastoj. Samtempe estis preparita ekspozicio de E-libroj, prospektoj kaj bildkarto. Pri la kongreso de ĈEA en Olomouc parolis s-anino M. Morávková, kiu ĝin partoprenis kiel delegitino. Vl.Rotrekl

ĈAPITROJ PRI LA SINDEFENDO

© Ing. Ivan Špička kaj Ing. Jindřich Novák

tuaciojn, kiuj estas por la atakanto malavantaĝaj (la t.n. hiperekvivalentaj situacioj por la defendanto), kaj eviti situaciojn ekvivalentajn kaj la neekvivalentajn, en kiuj estas la defendanto malavantaĝigita (la t.n. hipoekvivalentaj situacioj por la defendanto).

Tial estas antaŭ ĉio necese doni konsilojn, kiel eviti batalon en evidente maloportunaj kondiĉoj. Ĉi-cele ni kreis jenajn la t.n. taktikajn direktivojn:

- 1) Ni ĉiam tenu ĉirkaŭ ni sufiĉan vakan spacon aŭ ni klopodu havigi por ni sufiĉan tempo-rezervon, por ke la kontraŭulo ne povu komenci la batalon uzante insidatakon.
- 2) Ni mem male, se tio iomete eblas, komencu la batalon ĉiam insidatante.
- 3) Se ni ne povas solvi la sindefendo-situacion per insidatado, ni komencu interbatalon, uzante taktikajn principojn.

Oni povas memkomprene formuli pli multe da taktikaj direktivoj. Tamen multaj el ili estas tiel evidentaj, ke ne havas sencecon eksplicite prezenti ilin. Ekzemple, estas nepermeseble ne observi la kontraŭulon (turni al li nian dorson, fleksi trunkon antaŭen, ŝirmi nian frunton per manoj k.s.).

Se jam estiĝis interbatalo, la ĉefa tasko de defendanto estas teni oportunan distancon for de kontraŭulo. La teno de la interdistanco

- malebligas el kontraŭulo atakon,
- ebligas prepari sian propran atakon.

Ni haltu je momento ĉe unuopaj specoj de la interdistanco. Se batalanto povas ataki kontraŭulon sole post sia aŭ lia elpaŝo aŭ fento, ni diras, ke li staras paŝdistanco (for de la atakoto). Se oni povas ataki per piedfrapo (armilo) la kontraŭul-talion (kapon aŭ kolon), oni staras atingo-distanco. La distancon, el kiu eblas ataki je atingopovo de rektigita brako, ni nomas mezdistanco. La longeco de antaŭbrako estas la mezuro de mallonga distanco.

Facile pruveblas, ke, se kontraŭulo klopodas pliproksimigi sin el la paŝdistanco per paŝo, fento, sinalŝovo aŭ alsalto al atenta kaj ĝuste ekzercita staranta defendanto, tiu povas ĉiam (se li havas sufiĉan spacon) renovigi la originan interdistancon. Konservado de la paŝdistanco estas la plej bona defend-metodo kontraŭ ĉiun atakon, por kiu necesas malplilongigi la interdistancon. Ni formulu la jenan t.n. taktikan principon:

- 1) Ĝis kiam ni ne atakas, ni seninterrompe tenu for de la kontraŭulo la paŝdistancon.

Sed kion ni faru, se ni mem volas ataki? Se ni intencas, ekzemple, bati kontraŭulon, ni devas antaŭ ĉio atingi la mez-

distancon. Se ni volas piedfrapi aŭ bati per armilo, ni povas komenci nian atakon el almenaŭ la atingo-distanco. (Uzante armilon, ni ne distingas la mezan kaj la mallongan distancon, ni parolas sole pri la paŝdistanco kaj la atingo-distanco).

Por laŭeble malebligi estiĝon de ekvivalenta situacio, oni devas apliki la t.n. metodojn de sinsekurigo. Ni ankoraŭ traktos ilin. Sed pli frue ni priskribos pliajn taktikajn principojn:

II. El la paŝdistanco ni pliproksimigu nin al kontraŭulo uzante oportunan metodon de la sinsekurigo kaj poste ni tuj ataku, aŭ ni pliproksimigu nin per malrapidaj kaj neokulfrapaj sinalŝoj al la atingo-distanco. Ĉi tie ni daŭrigu la batalon laŭ la taktika principo n-ro III. Se la kontraŭulo komencas atakon dum nia translokiĝado, ni revenu en la paŝdistancon.

Oportunan interdistancon por realigi atakon ni atingas el la paŝdistanco dumaniere:

- per fento aŭ per malrapidaj sinalŝoj,
- ni profitas de la sama klopodo de la kontraŭulo.

El la paŝdistanco oni povas apliki konvenan metodon de la sinsekurigo kaj post rapida sinalŝo tuj ataki. Sed tiamaniere farita atako ne estas tre efika (ĝi daŭras relative longe). Multe pli bone estas pliproksimigi sin al la kontraŭulo, enkadre de la aplikita metodo de sinsekurigo, per neokulfrapaj sinalŝoj ĝis la atingo-distanco (mezdistance) kaj nur poste ataki lin uzante oportunan kikon. Malrapida, neokulfrapa translokiĝado el la paŝdistanco ĝis la atingo-distanco aŭ mezdistanco estas tre grava. Unue, la kontraŭulo ofte entute ne atentas tion kaj ne reagas en tiu ĉi okazo por subita atako aŭ malplilongigo de la interdistanco. Due, ni havas sufiĉan tempon (se estas necese) por renovigi la sekuran interdistancon.

Tre avantaĝe estas, kiam ni povas profiti de kontraŭul-klopodo mallongigi la interdistancon.

Ni revenu al la taktikaj principoj:

III. El la atingo-distanco ni ataku tuj, kiam nia provo pri apliko de oportuna metodo de la sinsekurigo estas sukcesa, aŭ uzante metodon de la sinsekurigo, ni transloku nin al la proksimdistanco kaj ĉi tie ni procedu laŭ la IV-a taktika principo. Se la kontraŭulo komencas sian atakon en la momento, kiam ni troviĝas en la atingo-distanco, ni renovigu la paŝdistancon.

IV. Proksimdistanco ni tuj ataku la kontraŭulon per la plej rapida batalago (frapo).

3.3. Metodoj de sinsekurigo

Per la metodoj de la sinsekurigo ni atingas en interbatalo relative sendanĝere la distancon oportunan por ataki. Uzante tiujn ĉi metodojn ĝuste, oni tre reduktas la probablon de koincida atako. Nun ni priskribos por ĉiu metodo de la sinsekurigo konkretan efektivigon. La principo de la metodo videblas el ĝia

nomo.

- 1) Metodo "blokado de movo." Defendanto kaj atakanto staras paŝdistance. Tuj kiam la atakanto elpaŝis por fari iun atakon (li sekve ektroviĝis atingo-distance), la defendanto piedfrapu genuon aŭ pli bone la talion de la kontraŭul-korpo (sunan plekson)(fig.36). Se la atako estas konvene altempigita, la trafoto, finante la paŝon antaŭen, ne povas samtempe piedfrapi la defendanton. Sed li eĉ ne povas endangerigi la defendanton per la manoj, ĉar li ne manatingas la trafanton. Krome, la atakanto havas ege plilongigitan reago-tempon (li ĵus realigis aŭ -as fortan kaj rapidan movon).

Estas evidente, ke la priskribita atakmetodo estas tre universala. Nin ne interesas, kion volas kontraŭulo fari konkrete, ĉu frapi nin per la pugno de la dekstra aŭ maldekstra brakoj, ĉu kiki nin aŭ bati per manplato aŭ manplatrande aŭ ĉu li intencas ĵeti nin surteren per evertito ekz. seoinago (japane: seoi-nage). Tio estas tre grava. Kontraste al la klasika koncepto de la sindefendo, kie la defendanto lernis nesupervideblan nombron da diversaj "defendoj", laŭ tiu ĉi koncepto li lernas, por defendi sin kontraŭ ajnan batalagon, antaŭ kiu la atakanto devas alpaŝi lin el la fronta gardostaro, nur unu. Se la atakanto turnis al la defendanto sian flankon aŭ se li batalgardostaras, ni tiun ĉi metodon rekomendi ne plu povas, ĉar la atako fare de la kontraŭulo povas esti en tiu ĉi okazo jam tiom rapida, ke la defendanto ne ĉiam havas sufiĉan tempon por efektiviĝi sian defendagon.

- 2) Metodo "blokado de signal-transigo." Defendanto pliproksimiĝas sin al la atakanto, kiu staras senmove (fig.37), kaj ĵetas sur lian vizaĝon poŝtukon (gazeton, manplenon da sablo, ĉapon, ĉapelon, manaktujon k.s.). Poste la defendanto rapide elpaŝas la atakanton de flanke kaj frapas lin per manoj aŭ piedo (oni povas memkomprene ankaŭ everti la kontraŭulon). Tiu ĉi agado aplikeblas, kontraste al la antaŭiranta, same kontraŭ armitan kontraŭulon (la kontraŭulo ja ne estu armita per pafarmilo!).

Tiu ĉi procedo estas el la prezentataj evidente la plej universala. Nokte oni realigas ĝin tiamaniere, ke oni brilblindigas la atakanton uzante lumon de elektra poŝlampeto aŭ oni starigas tiamaniere, ke la kontraŭulo estu brilblindigita per lumo de strata lanterno, eventuale per reflektoroj de preterveturantaj aŭtomobiloj. Malavataĝo de tiu ĉi metodo estas la bezono havi helpilon.

- 3) Metodo "blokado de atako." Ni atakas, kiam iel malaltiĝas atento de kontraŭulo (li ekzemple turnas al ni sian dorson aŭ flankon, li okupiĝas pri io, parolas kun iu k.t.p.). Se ni volas apliki tiun ĉi metodon, ni devas atingi antaŭe necesan sperton por ekscii, kiam homo ne kapablas tuj reagi laŭ venantaj signaloj. Ĉiutaga kontakto kun diversaj homoj donas por tio multajn eblecojn.
- 4) Metodo "blokado de atak-plano." Atakanto rapide alpaŝas aŭ alŝovas sin al la defendanto kaj volas ekzemple lin bati (fig.38). La defendanto venigas la kontraŭul-

-agadon forsaltante dorsen aŭ flanken. Nun estiĝas ŝanco kiki tibion de la atakanto. Tiun ĉi defendagon oni povas uzi (se estas neeviteble) ankaŭ kontraŭ atakanton armitan per nepaf-armilo. Sed sen granda sperto kaj mensa sinpreparo tio estas malfacila (fig.39). Tial oni la laste nomitan procedon kontraŭ la armitan kontraŭulon laŭeble ne aplikas.

La ĝis nun priskribitaj metodoj plene sufiĉas por sukcesa solvo de ordinaraj sindefendo-situacioj en batalo kontraŭ laŭkon, se ni ne aplikas armilojn, okazajn rimedojn kaj se ni ne profitas de avantaĝoj, kiujn donas la tereno. Pli da eblecoj surbaze de la kvazaŭ-signala koncepto de ekzercigado esence ne ekzistas.

Se ni havas okazajn rimedojn, kiuj ebligas bati kontraŭulon el distanco, en kiu ni mem ne estas plu senpere trafebblaj, ni aplikas jenan metodon de sinsekurigo:

- 5) Metodo de "pli avantaĝa armilo". Ni pliproksimigas nin nekulfrape al distanco, kie ni jam povas trafi kontraŭulon, sed kie li ankoraŭ nin per sia batalago atingi ne povas. Poste ni rapide atakas. La principo de tiu ĉi metodo estas do produktado de la batalsituacio, en kiu ni mem estas ekster atingo de eventuala kontraŭul-atako, sed li, rilate al la longo de nia armilo aŭ okaza rimedo, trafebla jam estas. Ekz., la atakanto estas armita per tranĉilo kaj ni per bastono. Tuj kiam ni sukcesis pliproksimigi nin al li je atingopovo de nia armilo, ni ekataku la kontraŭulon per piko celanta lian ventron. La pikon ni aplikas tial, ke pro ties rapideco ne estas eble vanigi ĝin. Ni povas ankaŭ klopodi pri trafo al manradiko de la kontraŭulo. Tio estas jam malpli facila, sed se ni estas singardemaj kaj pretaj pligrandigi la interdistancon, post nia eventuala nesukcesa atak-provo, ni povas ankaŭ tiamaniere la kontraŭulon preskau sendangerigi. Se li ne volas kapitulacii eĉ kun vundita manradiko, estas necese malebligi lian pluan batalon per peza bato celanta liajn tibion, kapon aŭ ventron.

Ni ne rekomendas sencele plidaŭrigi la batalon, ĉar atakanto povas eventuale ĵeti kontraŭ nin tranĉilon. Kaj kvankam estas vere, ke plimulto de homoj ne scias tranĉilĵetadon, estas malgraŭ tio sufiĉe probable, ke la tranĉilo hazarde turnos kontraŭ nin sian pinton. Tio okazas relative ofte.

Krom prezentitaj metodoj de la sinsekurigo ekzistas ankoraŭ iuj aliaj, kiuj bezonas jam specialajn kondiĉojn por realigo. Ekzemple jena metodo:

- 6) Atakanto kuras kontraŭ nin. En lesta momento ni forsaltu flanken (fig.40a). Sekve de tio la atakanto estas devigita subite halti. Li sukcesas fari tion tiamaniere, ke li apogas sin al la elpaŝinta gambo. Tial li ne povas samtempe piedfrapi (fig.40c). En tiu ĉi momento ni mem piedfrapas (fig.40dI, II).

Memkomprene oni povas piedfrapi ankaŭ sen forsalto flank-

(Ĉi-loke ni ellasis: fig.36 - 40, t.e. 22 desegnaĵoj).

AŬTUNA RENKONTIĜO EN DUDINCE ESTIS SUKCESA

30.8. - 5.9.1987 okazis denove en Dudince la renkontigo de Esperanta vegetaranoj, joganoj kaj ĉiuj amikoj de naturo. Mi kun gepatroj partoprenis ĝin jam triafoje, sed tamen alproksimigante trajne kreskis en mi pli kaj pli interna ĝojo, kiam mi ekvidos denove Dudince, ofereman kaj senlacaĵon s-ron Vána, kiu ĉion arangas kaj ĉiujn partoprenantojn. Bonvenigis nin malvarma vetero tie, sed ĝam de dua tago dum nia dektaga restado la suno rice varmigis nin kaj ni povis agrable bani nin en termala baseno, trinki el termala fonto, admiri sur sunitaj sekegaj deklivoj herbojn, ĉiuj en nia regiono ne kreskas, iom ekskursi ĉirkaŭajn, kie ankaŭ ofte estas eblecoj bani sin en termala akvo. Ĉar la partoprenantoj ĉi-jare venis pli multe, ni ĉiuj devis loĝi sur kelkaj lokoj en Dudince - en hotelo, kabanoj, Krom partoprenantoj el nia lando venis poloj, bulgaroj, jugoslavo, kaj alflugis ankaŭ rumana opera kantisto, kiu nun vivas en Ameriko. Antaŭtagmeze kaj iam vespere okazis interesaj prelegoj - Dr. Špelda prelegis pri forto de niaj pensoj kaj koncentrado de ili, pri siaj spertoj kiel homo povas esti feliĉa "memforte", pri utileco de konvena muziko, ktp. /bedaŭrinde li ankoraŭ nian lingvon ne scipovis, do li parolis nur ĉefe/, bulgara kuracisto instruis nin kiel savi homon sufokatan per mangajero, Ing. Doležal kun sia kolektivo denove prelegis pri vivmaniero Mazdaznan kaj kuracado per diversforma akvo, jugoslava s-ino rakontis kaj projekciis diapozitivojn pri sia voĵagado, Matene kaj antaŭvespere estis ekzercado de Jogo. La nedeviga programo estis rica, ni iam ne sciis kiel ĉion utilan trafi - ĉar mi estas malfacile invalida, do mi krom ĉio preferis ankaŭ kiel plej multe eluzi tiean raran akvon. Nur bedaŭre, ke neniu rakontis pri Tutmonda Esperanto-kongreso en Varsovio, mi antaŭĝojis tion /pasintjare rakontado kun projekciado de konata jugoslavino pri la UK en Ĉinio estis tre bela kaj interesa/.

S-ro Vána indikas ĉi renkontigon pro multe da preparzorgoj ktp., kiel la lastan /li atendis ĉe ĉia vagonaro alvenontojn kaj fine transportis per sia aŭto pekaĵojn al stacidomo, ĉion faris kaj kun ĉiu parolis bonhumore, ŝerceme, kiel pli kaj pli ĵuna ol li festos sian jubileon/, sed mi aŭdis de iuj adiaŭantoj, ke multaj el ni venontjare tamen al Dudince revenos kaj la feliĉa renkontigo restos almenaŭ "neoficiale" netuŝebla.

Ivana Drbohlavová, ĈSSR

SOMERA ESPERANTO-TENDARO en Lančov ce la valbarajo Vranov en la suda Moravio okazos en tri etapoj: I. 1988-07-03 - 1988-07-16
II. 1988-07-17 - 1988-07-30
III. 1988-07-31 - 1988-08-13

Informojn kaj aliĝilojn petu de: ESPERANTO-KLUBO TŘEBÍČ, 65-674 01 TŘEBÍČ, ĈEĤOSLOVAKIO

DUA INTERNACIA SPELEOTENDARO

Esperanto-klubo en urbo Liptovský Mikuláš organizis dum la tagoj 23-a ĝis 25-a de oktobro 1987 en Malaltaj Tatroj "Duan internacian speleotendaron". Partoprenis ĝin 23 esperantistoj-speleologoj el tri naciaj Esperantaj asocioj (ĈEA, HEA, SEA). Dum la renkontigo la partoprenantoj travivis interesan programon.

Vendrede okazis en la klubejo de la Esperanto-klubo malfermo de "Speleotendaro". Inaŭguris ĝin ing. Ondrej Lupták (Slovakio) - ceforganizanto. Prelegon pri hungaraj grotoj prezentis kaj projekciis kolorajn lumbildojn Péter Vukov (Hungario). Programo poste daŭris per diskuto pri rilatoj inter Esperanto kaj speleologio.

Sabate la 24-an de septembro komencigis ekskursoj en groto "Mier" (Paco) en Demánova-valo. Partoprenantoj trarigardis alirebligajn laborojn en la groto kaj vizitis aliajn partojn en tiu ĉi groto. La ekskurson gvidis unu el la tri malkovrintoj de la groto - Stanislav Šrol.

Posttagmeze grotistoj-esperantistoj vizitis arkeologian lokon - groton "Okno" (Fenestro) ankaŭ en Demánova-valo. En la groto kum impona granda portalo esploris scienculoj jam antaŭ okdek jaroj. La groto estis "logejo" de prahomoj.

Vespere en malgranda salono en hotelo "Poludnica" (civito Lipt. Ján) la grotistoj-esperantistoj kunvenis. Partoprenis ankaŭ kelkaj grotistoj el speleologia grupo Liptovský Mikuláš. Inter ili prezidanto de tiu ĉi grupo - František Bernardovič. Ili diskutis pri uzado de Esperanto en speleologio, pri farado de Esperanta speleologia vortareto kaj pri estontaj Esperantaj speleo-aranĝoj. Laste prelegis kaj projekciis kolorajn lumbildojn pri grotoj en Jánska-valo Pavel Procházka (Slovakio).

La 25-an de oktobro grotistoj-esperantistoj trarigardis surteran karston en Jánska-valo - montmasivon "Ohnište". La montmasivo "Ohnište" estas interesa pro kelkaj abismoj (la plej profunda estas Glacia abismo), karstfuneloj, stonfenestroj, imponaj rokegoj kaj aliaj karstaĵoj.

Dum la fermo de la "Dua internacia speleotendaro" la partoprenantoj aprobis jenajn konkludojn:

1. Ĉiuj esperantistoj-grotistoj disvastigos Esperanton inter speleologoj.
2. Ĉiujare okazos en alia loko "Internacia speleotendaro".
3. Esperanto-klubo en urbo L. Mikuláš koordinos laboron je la faka Esperanta speleologia vortaro.
4. Esperanto-klubo en urbo L. Mikuláš astos centro, kiu kolektos adresojn de esperantistoj-grotistoj.

La aranĝaĵo estis bone organizita kun rica programo. La partoprenantoj disiris al siaj hejmoj kontentaj.

J. Vajs

El agado de Okcidentoslovakia regiona komitato de SEA

La 28-an de novembro 1987 okazis kunsido de Okcidentoslovakia regiona komitato de SEA en Nitra.

La komitatanoj traktis precipe pri:

- taksado de organizo de X-a jubilea kongreso de SEA kaj rezultoj de ĝi, kiu okazis dum junio en Nitra
- anonco pri ricevo de honorigo al Milan Menhart, prezidanto de RK, de konsilantaro de Urba nacia komitato en Nitra
- informado kaj impresoj de partoprenantoj de 72 kongreso en Varsovio
- informado, ke EK en Nitra kaj RK akiros konvenajn spacojn en Nitra por sia agado.

SEKCIO DE SAKISTOJ

FULMRAPIDA ŜAKTURNIRO

Fulmrápida ŝakturniro de teamoj okazis en Palaco de Kulturo en Prago la 6-an de novembro 1987.

Partoprenis 84 teamoj dividitaj en 5 klasojn; la teamo de EŜLI akiris la 4-an lokon en sia klaso. Tio estas bona propagando de Esperanto.

La EŜLI-teamo partoprenos la turniron ankau ĉi-jare, sed estas necese, ke efektive partoprenu ĉiuj invititaj ŝakistoj-esperantistoj por pligrandigi la sukceson de la teamo.

La 12-a Renkontigo de esperantistoj-ŝakistoj en Poděbrady okazos de la 1-a ĝis la 3-a de julio 1988. Ni invitas ĉiujn geesperantistojn, ankau tiujn, kiuj ne ludas ŝakon. Riĉa programo estas preparita. Informojn kaj aligilojn vi ricevos de Václav Štěpánek, Macurova 16, 140 00 Praha 4, tel. 792 3903.

o

2-a Harca Esperanto-Renkonto (HER'87)

Dedice al la jubileo de 1^a internacia planlingvo okazis inter la 9-a kaj 11-a de oktobro 1987 la 2-a Harca Esperanto-Renkonto en Quedlinburg apud la pitoreska Harcmontaro.

La semajnfinan arangon, kiun partoprenis 70 samideanoj el GDR, FRG, Pollando kaj Ĉeĥoslovakio, organizis Subdistrikta Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR en Quedlinburg.

Kiel honoraj gastoj alparolis la ceestantojn dum solena inaŭguro d-ro Rudolph - prezidanto de Subdistrikta Estraro de Kulturligo en Quedlinburg - kaj dipl. ing. Bartos - prezidanto de Distrikta Esperanto-Asocio en Halle.

Saluttelegramoj alvenis el Pollando, Danio kaj Japanio.

Tri apartaj urbogvidadoj ekkonatigis kun la plej gravaj vidindaĵoj (katedralo, kastelo, lignofakaj konstruaĵoj, foirplaco). Dum tiuj la gastoj ankau detale povis informigi pri la malsupresaksa lignofaka konstrustilo per praktikaj ekzemploj.

Speciale arangita ekspozicio "100 jaroj de Esperanto - Por paco kaj interkomprenigo" en Domo de Kulturligo donis valorajn informojn al ĉiuj partoprenintoj kaj urba publiko kaj atentigis la eminentan rolon de la planlingvo Esperanto.

Bazaro ofertis diversajn librojn, revuojn, suvenirojn, unuataĝajn kovertojn kun jubilea pm-o kaj porokaza stampo, bk-ojn, pk-ojn ktp.

Je sabata vespero kulturprogramo kun diskoteko kaj kabareto amuzis ĉiujn.

Dimanĉon la HER-anoj komune ekskursis al Thale, migradis de tie en la sovaĝe romantikan valon de Bode-rivero kaj veturis per telero al la fama rokoplataĵo "Sor-cistina Dancejo".

Dum la tuta arango ekzistis multaj eblecoj por personaj renkontoj, spertintersangoj, babiladoj kaj amuzigoj.

Ĉiam regis amika atmosfero kaj samtempe belega vetero.

Klaus Klimt

x - x

En la 2-a jarduono 1987 sukcese finis la korespondan kurson de lektorino Eva Hoffmannová en Praha jenaj kursanoj:

1. Zdenka Netrhová, Újezd 183, Cerhovice
2. Jana Jankolová, Welkerova 401, Votice
3. Zdeněk Šturma, Nové nádraží 1275, Velké Meziříčí
4. Dr. Stanislava Weigová, Klimentská 14, Praha 1
5. Dagmar Bulantová, Uzebecká 1463/1, Praha 10
6. Ivo Kolouch, Vendolí 22

Gratuloni!

KONVERSACIO por progresintoj



Dektria temo : K O R P O K A J M A L S A N O J

La korpo de homo havas supre la kapon. Sur la kapo oni vidas antaŭe vizaĝon. Super kaj malantaŭe estas haroj, blondaj, brunaj, nigraj, grizaj, flavruĝaj, rustkoloraj aŭ alikoloraj. Iam la kapo estas kalva. La harojn oni ĉiutage kombas. Post certa tempo oni bezonas frizaĵon, ĉar la haroj rapide kreskas. La frizistoj la harojn tondas, krispigas aŭ bukligas. Precipe la frizaĵoj de virinoj estas belaspektaĵoj. Sur la vizaĝo estas sub la haroj frunto, sub ĝi estas du okuloj. Super okuloj estas brovoj, la okulojn ŝirmas per kovrado palpebroj kun okulharoj. En okuloj estas nigraj pupiloj kaj diverskoloraj irisoj. Per okuloj la homo vidas kaj rigardas. Dum ploro aŭ alikaze el okuloj fluas larmoj, plorenta homo singultas. En la mezo de la vizaĝo estas nazo inter du vangoj. Per la nazo oni flaras kaj mukas. Sub la nazo estas buŝo, kiu estas fermita per du ruĝaj lipoj. En la buŝo estas palatoj, dentkarnoj aŭ gingivoj, langoj kaj dentoj. Tranc-, kojno-, angul-, kaj mueldentoj estas diversformaj kaj diverse uzataj. Sub la buŝo estas mentono. Flanke de la kapo estas du oreloj. Oni vidas orelokornojn, la fakta organo de aŭdo estas en la interno de la kapo. Santepe tie estas organo de stabileco. Sur la vizaĝo kreskas ĉe viroj barboj, kiujn oni razas per raziloj aŭ razklingoj. Nuntempe oni uzas ankaŭ razaparatojn. La vizaĝoj estas diferencaj, ĉiu homo havas sian fizionomion. En la vizaĝo montriĝas la humoro.

La kapon kunigas al la trunko kolo. La antaŭa parto de la kolo estas gorĝo, la malantaŭa nuko. Sur la antaŭa trunko estas supre brusto kun mamoj kaj cicoj, malsupre ventro kun umbiliko. Malantaŭa trunko estas dorso. Supraj partoj de la dorso estas ŝultroj kun skapoloj, malsupre estas koksoj. La malsupra parto de la dorso estas postaĵo kun du gluteoj aŭ sidvangoj. Sub la ventro estas sekreciaj kaj seksaj organoj. Ĉe viro estas videbla penis kun testikulo, ĉe virino estas videbla nur vulvo. La vagino, utero kaj ovario situas en la ventro. Dum koito la penis penetras tra la fendo de la vulvo en la vaginon. Alie tie estas eligata urino el la korpo.

La homo havas kvar korpomembrojn. La supraj estas brakoj. Ĝi komencas de la ŝultro, en la mezo estas fleksebla kubuto, la ekstremaĵo estas mano kun manplato kaj kvin fingroj: polekso, montro-, mez-, ring- kaj malgranda fingroj. Sur la fingroj estas ungoj. La kunpremita mano estas pugno. Manpleno estas kvanto prenita per unu mano. La malsupraj korpomembroj estas gamboj. Supre estas femuro, sub ĝi estas fleksebla genuo, poste estas kruro kaj fine piedo kun halukso

kaj kvar fingroj. La malsupro de la piedo estas plando kaj kalkano, super la kalkano estas du maleoloj. Ankaŭ sur piedaj fingroj estas ungoj.

La korpon tegas haŭto, kiu havas diversajn kolorojn. Oni parolas pri homaj rasoj. En la haŭto estas poroj, el kiuj eliras ŝvito. Sur la haŭto estas alikoloraj lentugoj kaj malmolaj verukoj. Sur la haŭto, precipe en faldoj kreskas haroj, pli ofte ĉe viroj. La korpon firmtenas la skeleto, kiu konsistas el multaj ostoj. La kranio kun du makzeloj estas en la kapo, spino kun vertebroĵoj estas en la dorso. La ekstremaĵo de la spino estas kokcigo. La brusto havas ripojn, en la kruro estas tibio. La ostoj estas kunigitaj en artikoj. Tie estas tendenoj kaj malpli molaĵ kartilagoj. Sur la ostoj estas muskoloj. Se oni vundas la haŭton, oni jam vidas muskolan, sed oni parolas pri karno. En la tuta korpo cirkulas la sango en angioj. Arterioj kondukas la sangon el la koro kaj vejnoj al la koro. La koro cirkuligas la sangon per sia pulsado. La koro situas en la brusto, tie situas ankaŭ pulmoj kun bronĥoj, per kiuj oni spiras kaj havigas oksigenon. En la ventro estas stomako kun duodeno kaj intestoj. En la kranio estas cerbo, en la spino estas mjelo. Tien celas nervoj el muskoloj kaj precipe el organoj por vido, aŭdo, flaro, apetito kaj palpo. Oni nomas ilin kvin sensoj aŭ sentumoj. En la korpo estas diversaj glandoj, kiuj sekrecias hormonojn. Timuso estas en la kolo kaj influas la kreskon de la korpo. Tiroido estas pli profunde kaj efikas je la procedoj en la korpo. En la tiroido estas pli da jodo. Hepato estas grava por la digestado. Renoj purigas likvaĵojn en la korpo kaj masigas urinon en la veziko por eligi ĝin.

La malsana korpo ne funkcias bone. Pluraj malsanoj estas sekvigigitaj per baciloj kaj bakterioj, kiuj situas ĉie en la aero kaj eniras facile la korpon. Iam ili estas utilaj, sed malutilajn strebas leŭkocitoj en la sango sendangerigi. Se la malutilaj bakterioj estas tro multaj, do aperas infekta malsano. Tiuj malsanoj estas nomataj ankaŭ kontaĝaj, ĉar sufiĉas eĉ la tuŝo de alia malsanulo kaj oni malsanigas. Pro rapida disvastiĝo ili nomiĝas epidemiaj aŭ pandemiaj. La febro estas signalo, ke la leŭkocitoj ne kapablas sendangerigi multajn bakteriojn. Normala temperaturo de la korpo estas 37 gradoj, sendepende de la ĉirkaŭaĵo. En kazo de febro la kuracista termometro montras diferencon temperaturon. Nazkatario estas akompanata per ternado, la nazo eligas multajn mukojn. Oni ankaŭ tusas. Gripo kaj diversaj brulumoj kaj inflamoj estas pli gravaj. Pulmito estas inflamo de pulmoj. Tonsilito aŭ amigdalito estas inflamo de tonsiloj, kiuj situas malantaŭe en la buŝkavo. Angino estas inflamo de la gorgo. Difterio estas grava malsano de gorgo, precipe ĉe infanoj. Skarlatino kaj morbilo estas malsanoj karakterizataj per rugaj makuloj de la haŭto. Disenterio kaj tifo estas inflamoj de intestoj. Holero estas grava malsano de intensa malvarmigo de la korpo. Malario estas febro precipe en tropikaj landoj. Variolo estas malsano, kiu difektas la haŭton. Parotito estas inflamo de oreraj muskoloj. Pesto estas mortiga inflamo de pulmoj. Apendicito estas inflamo de malgranda parto de intesto. Kontraŭ multaj malsanoj ŝirmas la vakcinado per injektoj. Laste aperis malsano, kiu sekvigis, ke la homo perdis kapablon rezisti malsanojn, tielnomatan imunecon. Tiu malsano estas signata per literoj AIDS.

Aliaj malsanoj estas kaŭzigitaj per malbona manĝado kaj frandado. Oni povas alte rukti kaj vomu buŝspecojn. Aperas pirozo. Pli grava afero estas venenigo de toksaĵoj. Se ne estas rapida helpo, oni mortas,

Ĥalie venas diareo aŭ konstipo, do lakso aŭ mallakso. La malbona zorgo pri dentoj sekvigas elmorditajn kavajn dentojn, difektitajn de kario. Paradentozo malfermas gingivojn, la dentoj ŝanceliĝas. Skorbuto estas malsano de gingivoj. Tiujn malsanojn povas kaŭzi eĉ epizootio transportita de bestoj. Rakito estas moliĝado de ostoj. Manko de jodo sekvigas kropon.

Haŭtaj malsanoj estas dermatozoj. Dartro estas nekomunikebla, ekzemo komunikebla. Furunkoj estas aperaĵoj sur la haŭto, plenaj de pus. Abscesaj estas pli grandaj furunkoj, ili doloras. Ulceroj estas vundoj de la haŭto. Aknoj estas svelaĵetoj, favo estas krusiĝo, en granda skalo temas pri psoriazio. Haŭteroj aperas precipe sub haroj, post brulo aŭ premo aperas vezikoj. La malsana haŭto jukas kaj oni gratas sin. Sur la haŭto kaj ĉie en la korpo povas aperi tuberoj kaj tumoroj. Hernio estas tubero produktita de parto de intesto.

La muskoloj malsaniĝas je spasmio, kiam oni ne povas movi sin, aŭ je konvulsio, kiam la muskoloj tremas kaj skuigiĝas. La suno povas sekviĝi sunfrapon kaj encefaliton. Sed eĉ la nura sunbruniĝado povas esti danĝera. La apopleksio estas malsano de la koro. Infarkto ofte gvidas al morto. Ftizo aŭ tuberkulozo estas malsano de pulmoj. Kancero estas malsano, dum kiu kreskas multaj tumoroj. Iksodoj iam sekvigas per sia mordo mjeliton. La okulo povas esti miopa aŭ malmiopa, tiam oni portas okulvitrojn. Leŭkomo, katarakto kaj amaŭrozo difektas iam la vidkapablon kaj gvidas la blindeco. Surda homo ne aŭdas, muta homo ne parolas, lama homo ne paŝas bone.

La homo povas vundi sin per tranĉo, piko, bato aŭ alimaniere. Tiam aperas kontuzoj, ŝveltuberoj ostrompoj aŭ ŝokoj. Post resaniĝo povas sur haŭto resti cikatroj. Malsanoj povas kelkaj organojn lezi.

La malsanulo kuracas sin laŭ la konsulto de kuracisto. En gravaj kazoj li estas paciento de hospitalo. Kuraciloj estas diversaj. Medikamentoj aŭ farmaciaĵoj estas preparataj en apoteko. Piloloj estas pecetoj por engluti aŭ solvi en akvo. Pulvoroj estas solveblaj en akvo aŭ alia likvaĵo. Ungventoj estas surŝmirataj. Injektoj estas enŝprucataj per pikilo sub la haŭton aŭ en la vejnon. Plastroj kaj specialaj dia-kiloj estas algluataj sur la haŭto. Amoniako kaj joda tinkturo purigas vundojn kaj mortigas bakteriojn. Vato ŝirmas vundojn kaj kaptas puson aŭ sangon. Bandaĝo ĉirkaŭvolvas korpoparton. Kompreso mildigas brulumon kaj ŝirmas la unĝventon. Ĥirurgio kuracas per amputo, operacio aŭ transfuzio. Pacientoj estas plej ofte narkotitaj aŭ anestezi-taj. Homoj sen kelkaj partoj estas invalidoj. En hospitaloj zorgas pri pacientoj ankaŭ flegistoj. La kuracistoj diras diagnozon kaj preskribas receptojn, laŭ tiuj la malsanulo ricevas medikamentojn en apoteko. Kelkaj malsanuloj bezonas lambastonojn, protezojn aŭ ĉaretojn. Ofte post resaniĝo homoj bezonas ŝanĝi laboron, ili estas handikapitaj, alitempe ili ripozas en sanatorioj. Tie ili ekzemple banas sin en koto el argilo aŭ torfo, predipe se ili estas malsanaj je reŭmatismo, kiu doloras en artikoj.

Stomatologio estas la scienco pri la homa korpo, anatomio pri strukturo de organoj. Multaj organoj havas sciencajn nomojn: abdomeno estas korpa interno kun intestoj, dum generale oni parolas pri ventro. La higieno studas rimedojn, kiel konservi la sanon, ĉefa postulo estas pureco. Oni akcentigas ĉiutage tualeton kiel bonan manieron de preventado kontraŭ malsanoj.

La virina korpo, kiu dum gravedeco portas en si membrion kaj feton,

estas por tiu tasko perfekte ekipita. Se la virino ne estas graveda, ŝi regule menstruas. Tia menstruado komencas, kiam la knabino estas en la puberiĝa periodo kaj ĉesas en la klimakterio.

Krom malsanoj de korpo ekzistas malsanoj psikaj. Psiko estas funkciado de la cerbo. Religiaj homoj kredas, ke ekzistas animo sendependa de la korpo, kiu la korpon vivigas. Gravaj psikaj malsanoj estas epilepsio, kiam oni perdas kontrolon pri siaj movoj, obscedeco, kiam oni estas enrudata fari ion. En psikaj malsanoj malbone funkcias nervoj, tamen oni povas eĉ senti dolorojn.

GRAMATIKO:

1. Trovu nomojn de malsanoj kun pseŭdosufikso -ito.
2. Diru Esperantajn vortojn anstataŭ: hospitalo, sanatorio, eble aliaj kaj dividu ilin laŭ kunmetado.
Ekzemplo:
MALAMIKIGI mal - amik - iĝ - i

STILO:

1. Priskribu vian malsanon, kiel la kuracisto kuracis vin, ĉu vi kuŝis en hospitalo, kiom da tempo la malsano daŭris.
2. Skribu dialogon inter kuracisto kaj paciento.
3. Priskribu la nuntempan sanitaran zorgon.

DEMANDOJ:

1. Kiom oni pagas por la kuracado ?
2. Kiu vakcinado estas devoliga ?
3. Kiujn malsanojn vi suferis ?
4. Kian celon havas kvaranteno kaj izolado ?
5. Kiujn oni metas la kuracistan termometron ?
6. Kiel longe studas kuracistoj ?

RIMARKO al la naŭa temo " Universo " en Starto, n-ro 4/1987:

La tasko en Stilo " Provu skribi rakonton pri la sunsistemo," estis jam solvita en la gazeto " JUNA AMIKO ", numero 1/40, 14-a jaro, aperinta en februaro 1987. Tiu gazeto por esperantistoj-komenculoj aperas kvarfoje jare en Hungario, sed ĝi estas abonebla per ĉeĥoslovaka poŝta gazetara servo.

ĈAPITROJ el INTERLINGVISTIKO

3. LEIBNIZ

Aparta loko en la historio de la lingvoplanado apartenas al la granda germana sciencisto Gottfried Wilhelm Leibniz /1646-1716/, filozofo kaj matematikisto. Liaj ideoj grave influis la tiaman teorion de universala lingvo. Li bazis sian koncepton sur logiko. Li supozis, ke ĉiuj komplikaj ideoj estas kombinaĵoj de simplaj ideoj, precize tiel, kiel ĉiuj divideblaj nombroj estas obloj de nombroj nedevideblaj. Leibniz opiniis, ke ĉiujn simplajn ideojn eblas ordigi en limigitan sistemon - siaspecan "alfabeton de la menso" -, el kiu ĉiuj imagoj estos deriveblaj per matematike precizaj reguloj. Tiamaniere li kreis koncepton de filozofia lingvo en formo de matematika modelo, kiu ebligas esprimi ĉiujn pensajn procedojn per nombroj.

Por ke eblu krei tian filozofian lingvon, necesus prilabori ĝiajn vortaron kaj gramatikon. La unua tasko laŭ opinio de Leibniz premias analizon de ĉiuj ideoj de la homa racio kaj ilia grupigo en sistemon de simplaj ideoj. La dua tasko - konstruo de la gramatiko - postulis analizon de rilatoj inter la ideoj kaj de esprimado de tiuj rilatoj en diversaj lingvoj.

Tiu grandioza intenco ne povis esti realigita per unu fojo en plena amplekso; en la unua etapo necesis ellabori la filozofian gramatikon kaj apliki ĝin ĉe iu natura lingvo, ekz. la latino, kaj iom-post-iom sargi la latinajn vortojn per artefarita vortaro, formita per supre skizita metodo. Tiamaniere Leibniz prezentas du diferencajn sistemojn: lingvon surbaze de la latina vortaro kaj filozofia gramatiko, kaj lingvon, en kiu kaj la vortaro kaj la gramatiko estas same "filozofiaj". La unua el ĉi tiuj projektoj, kiu en la nuntempa scienco pri la artefaritaj lingvoj /interlingvistiko/ akiris pli gravan pozicion, signifas samtempe cedon for de la empiriaj principoj.

Kiel Leibniz imagas la filozofian gramatikon? La gramatiko devas scii esprimi ĉiujn gramatikajn signifojn de ĉiuj lingvoj /ĝi devas esti universala/ kaj samtempe ĝi devas esti senigita de ĉiuj esceptoj kaj malregulaĵoj de naturaj lingvoj /ĝi devas esti racia/. Leibniz trovas senbezonaĵ distingadon de genro ĉe substantivoj kaj diversajn modelojn por deklinacio kaj konjugacio; la deklinaciajn finaĵojn li proponas anstataŭigi per prepozicioj, la personajn finaĵojn ĉe verboj per memstaraj pronomoj en la rolo de subjekto, la verbajn modojn per konjunkcioj. Alivorte, li preferas formojn analizajn /dismetitajn je pluraj vortoj/ kiel en la angla antaŭ formoj sintezaj /kunmetitaj/ kiel en la latino. Leibniz samtempe supozas, ke kelkajn gramatikajn kategoriojn oni povus eluzi multe pli vaste: ekzemple la kategorion de tempo li proponas disvastigi de verboj

ankaŭ al substantivoj kaj adjektivoj /ekzemplo de Leibniz: amavutio - estinta amo; amaturitio - estonta amo/, la komparacion ankaŭ al verboj kaj substantivoj ktp. Kiam en la mezo de la 20-a jarcento aperis antaŭ la lingvistiko tasko ellabori lingvojn - perantojn de maŝina tradukado, la gramatiko de tiuj lingvoj en multo montriĝis proksima al la teoriajn konkludoj de Leibniz.

Descartes, Komenio kaj Leibniz iĝis fondantoj de unu el la disciplinoj de lingvistiko, kies disvolvigo povis efektiviĝi nur en nia jarcento. Ja en la 17-a jarcento la lingvistiko en la vera senco de la vorto ankoraŭ ne ekzistis. La homoj kutime pensis, ke la lingvo estas donaco de Dio, kaj la multlingvecon ili klarigadis per la Babilona konfuzo de lingvoj, priskribita en la Biblio. La lingvistiko kiel scienco pri lingvo formiĝis nur je la komenco de la 19-a jarcento. Kiel ĝiaj fondantoj estas agnoskataj kvar scienlistoj: dano R.K.Rask /1787-1832/ kaj tri germanoj, nome F.Schlegel /1772-1829/, F.Bopp /1791-1867/ kaj J.Grimm /1785-1863/, kiu estas pli konata kiel fabelisto. La tiama lingvistiko estas nun nomata komparistiko kaj opiniata kiel unu el la disciplinoj de la ĝenerala lingvoscienco. Aliaj disciplinoj estas ekzemple sociolingvistiko, kiu esploras la rolon de lingvoj en la socio, la psikolingvistiko sekvas la funkcion de lingvo en la parola procedo, la neolingvistiko okupigas pri rilato inter lingvo kaj la homa cerbo ktp. La interlingvistiko estas scienco pri artefaritaj lingvoj. Ĝi esploras demandojn kiel ekzemple, ĉu eblas formi lingvon per artefarita vojo, kiajn kvalitojn ĝi devas havi, al kiuj celoj ĝi devus servi, kiama maniere ĝin formi kaj kiamaniere enkonduki en la praktikon, kiel klasi jam ekzistantajn lingvoprojektojn ktp.

Libere laŭ Kuznecov



4. SOLRESOL

En la jaro 1916 la fama hungara satiristo Frygyes Karinty verkis daŭrigon de la aventuroj de la Swifta heroo, Gulivero. La aventuroj estas transportitaj en la tempon de la unua mondmilito kaj nomataj Vojaĝo al Faremido. Faremido estas nomo de misterplena planedo, sur kiun oni forkaptis Guliveron rekte el surmara batalo. Sur la planedo loĝas ankoraŭ pli misterplenaj, pacamaj estuloj, interkomprenigantaj per speciala muzika lingvo. La muziko de tiu lingvo agrable plenigas la tutan pejzaĝon. La vortojn eblas esprimi niamaniere helpe de la silaboj DO RE MI FA SOL LA SI. Ĉiun vorton kaj ĉiun frazon eblas kanti, fajfi, ludi per ĉiu ajn muzikilo, montri sur fingroj aŭ per koloraj flagetoj k.s. Se oni uzas la parolan formon, ĉiuj vortoj devas konsisti el la sep menciitaj silaboj kaj tial aperas la strangaĵ nomoj kiel Faremido, Midore, Lasolmi

kaj aliaj. Sed Karinthy ne estas kreinto de ĉi tiu originala ideo; li nur uzis la internacian muzikan lingvon Solresol, kiu estiĝis cent jarojn antaŭe.

La aŭtoro de Solresol, franco Jean-Francois Sudre, publikigis sian lingvon en la jaro 1817 kaj vere akiris certajn sukcesojn en Francio kaj Anglio. La Franca Instituto, konsistanta el la Akademio de Sciencoj kaj Akademio de Artoj, entute kvarfoje /en 1827, 1833, 1839 kaj 1856/ starigis fakan komisionon por desvastigi ĉi tiun lingvon; en la komisiono laboris signifoplenaj sciencistoj de tiu epoko. Victor Hugo kaj Alexander von Humboldt esprimis al la aŭtoro de Solresol siajn simpatiojn kaj sian subtenon. Dum la Mondekspozicio en Parizo 1855 ricevis Sudre premion de 10 000 frankoj kaj ĉe la ekspozicio en Londono 1862 honoran medalon. La franca ĉefstabo traktis la demandon, ĉu ne eblus eluzi la sistemon de Sudre por la lumsignalado en la armeo kaj ĉefe ĉe la mararmeo. En 1857 estis Sudre venigita al la kortego de Napoleono la III-a, al kiu li prezentis sian lingvon. Ankorau en 1866, kvar jarojn post la morto de la aŭtoro, aperas Solresol presforme, sed tamen ĝi ne igas la universala lingvo.

Konsciinte, ke la naciaj lingvoj formas siajn vortojn el proksimume du mil silaboj, ni facile komprenos, kial lingvo kun sep silaboj ne povas konkurenci al ili. Ĝia vorttrezoro estas komparebla nur kun la gest-lingvo de surdmutuloj /ĉirkaŭ kvin mil esprimoj/. Ĝi taŭgas por interkomprenigado de turistoj, sed ne por la faka kaj beletra literaturoj. La strangaj vortoj /doredo - tempo, doremi - - tago, dorefa - semajno, doresol - monato, dorela - jaro/ en granda kvanto malfacile memoreblas kaj en sia muzika formo ili estas preskaŭ neaŭdeblaj por homoj sen muzika aŭdo. Tial Solresol restis nur interesa kuriozaĵo.

Laŭ Kuznecov

La 5-an de decembro 1987 post longa malsano mortis prezidanto de Slovakia Esperanto-Asocio, komitatano A de UEA

D-ro Andrej Lukáč


en la plej aktiva aĝo de 56 jaroj. Li estis esperantisto de la jaro 1949 kaj en la landa asocio li ekagis en la jaro 1970. Li estis sekretario, poste prezidanto de Esperanto-Klubo en Prešov, baldaŭ estis elektita kiel prezidanto de Orientslovakia regiona komitato. Depost la jaro 1973 li estis aktiva membro de la Centra komitato kaj en la jaro 1983 dum la landa Esperanto-Kongreso en Žilina li estis elektita kiel prezidanto de Slovakia Esperanto-Asocio. Sub lia gvidado la asocio kreskis ĉiuflanke, pligrandiĝis la membrobazo, vigliĝis internacia kunlaboro.

Honoron al lia internacia kaj enlanda poresperantaj agadoj.

Membro de la Esperanto-rondeto en Haviřov

s-ano Zdeněk Mrowca

mortis la 31-an de decembro 1987 en sia 68-a vivojaro. Li estis vigla esperantisto, multe korespondis kaj partoprenadis Esperantajn aranĝojn. Honoron al lia memoro!



KORESPONDO DEZIROJ ANONCOJ

49-jara pensiulino deziras korespondi kun esperantistinoj el Ĉeĥoslovakio. Adreso: Eugenia Wołkowycka, ul. Lenina 40/31, 17-200 Hajnówka, Pollando.

20-jara studentino de geologio interesiĝas pri turismo kaj poezio, satas montojn kaj super ĉio Tatrojn, kolektas diapozitivojn. Adreso: Marzena Bąk, ul. Styczna 10, PL-31-769 Kraków, Pollando.

12-jara lernantino de sesa klaso en elementa lernejo, anĝ de teatra ensemblo "Klops", interesiĝas pri muziko kaj kolektado de bildkartoj kaj bestoj, hejme si havas hamstron, ludas pianon kaj volas korespondi. Adreso: Monika Wronska, ul. Słowika 7c/12, 44-224 Knurów, Poll.

21-jara studentino interesiĝas pri turismo, literaturo kaj sporto, kolektas bildkartojn. Adreso: Iwona Śnieżyńska, str. Bartnicza 7/47, 09-400 Płock, Pollando.

19-jara lernantino interesiĝas pri turismo, literaturo kaj folkloro, kolektas postmarkojn kaj bildkartojn. Adreso: Renata Falarz, Parkosz 80, 39-220 Pilzno, Pollando.

Volas korespondi tutmonde Rafał Rozenkiewicz (18-jara), ul. Klasztorna 80, 86-100 Świecie, Pollando.

30-jara laboristo interesiĝas pri turismo kaj automobiloj. Adreso: Przemysław Więcek, Gałowo 18, 78-400 Szczecinek, Pollando.

41-jara oficisto interesiĝas pri sporto, praktikas ĵogon, kolektas postmarkojn. Adreso: Leszek Draczan, Os. 25-lecia PRL 2/21, 64-980 Trzcianka, Pollando.

26-jara kuracistino interesiĝas pri vojaĝoj, turismo, literaturo. Adreso: Ewa Szybutowicz, ul. Krotka 3/2, 11-600 Węgorzewo, Pollando.

22-jara studento interesiĝas pri historio, literaturo, eksterlandaj lingvoj,

muziko, sporto, kolektas bildkartojn. Adreso: Radosław Ragan, ul. Stefana Batorego 7/1, Katowice, Pollando.

23-jara asistantino laboranta en la sanitara centro interesiĝas pri filmoj, libroj kaj Esperanto. Adreso: Barbara Janus, Stropieszyn 11, PL-28-503 Sokolina, Woj. Kieleckie, Pollando.

34-jara cambropentristo kolektas bildkartojn de urboj kaj postmarkojn, lia hobbio estas geografio, turismo, sporto kaj vojaĝoj, li tre satas korespondi. Adreso: Jan Skiba, ul. Florianska 16/22 44-200 Rybnik, Pollando.

14-jara lernanto interesiĝas pri sporto, kolektas postmarkojn, bildkartojn kaj monojn (monerojn kaj monbiletojn). Adr.: Johano Machała, ul. Nowe Miasto 6, PL-67-115 Bytom Odrzański, Pollando.

26-jara ekonomiisto interesiĝas pri literaturo, filatelo, muziko, ornitologio kaj geografio, estas fervora akvaristo. Adreso: Tomasz Prochniak, 89-413 Wąwelnio, woj. Bydgoszcz, Pollando.

23-jara polino interesiĝas pri turismo, fotografaĵoj kaj Esperanto, kolektas turismajn prospektojn, ilustritajn revuojn, bildkartojn. Adreso: Mirosława Kociel, ul. Lumumby 32 B/7, 80-367 Gdansk, Pollando.

Por prilaborata familia historio kaj fondata Familia Esperanto-Klubo informojn pri logantaj en diversaj landoj familioj Knobloch, Knoblock, Knoblauch, Knebloch, Knoblich k.s. sercas: Wanda Knobloch, skr. poczt. 312, PL 50-950 Wrocław 2, Pollando.

29-jara kuracisto deziras korespondi kun junularo el nia lando, liaj interesoj estas: foto, sporto, fremdlingvoj kaj muziko, kolektas kalendaretojn. Adr.: 349339 USSR, g. Vahruŝevo, Vorosilovgradskoj obl., kv. Posteva 2/II, Ĉekomasov Vjaceslav Vasiljevic

23-jara bindistino interesigas pri sporto, naturo, vojaĝado, kolektado de bildkartoj. Adreso: Vlasta Pištiková, Jirešková 5, CS-170 00 Praha 7, Ĉeĥoslovakio.

24-jara vestokonstruistino, komencantino, interesigas pri kulturo, literaturo, vojaĝado. Adreso: Jitka Pöpperlová, Národní 37/4, CS-110 00 Praha 1, Ĉeĥoslovakio.

20-jaraga pola studento, jogano, vegetarano, satas muzikon, literaturon, Hindujojn (muziko kaj filozofio: Gandhi, Tagore), papiliojn, florojn, interesigas pri lingvoj (lernas la rusan, germanan, anglan, latinan, cinan), pasia kolektanto de libroj (temo de la studado) kaj fervora esperantisto ĝargas plumamikojn tutmonde kaj intersangas librojn, esperantaĵojn, pm, bk ktp. Adreso: Maksym Szot, Kościuszki 17A, 78-440 Czaplinek, Pollando.

22-jara studento de rusa-germana fako de Universitato Lajos Kossuth en Debrecen interesigas pri lernado de fremdaj lingvoj (li scias ankaŭ iom ĉeĥe), pri E-movado kaj turismo, kolektas bildkartojn pri urboj kaj postmarkojn, volas korespondi kun juna esperantist/in/o. Adreso: Gábor Medveczki, Ibolya u. 9, et: 1, ap: 4, H-4027 Debrecen, Hungario.

G R A V E

En 1988 jaro - 8888 adreso: Esperantista societo "Kulturo" - Ruse aranĝas grandan adresaron el la tuta mondo dum 1988-a jaro. Ni petas skribi klare viajn adresojn. Sendu minimume unu respondukuponon aŭ tri bildkartojn. Adreso: 7000 Ruse, p.k. 208, Esperantista societo "Kulturo", Bulgario.

Esperanto-klubo en la HANKUK Universitato por Fremdaj Studoj fondigis antaŭ 3 jaroj kaj nun ege diligente klopodas por disvastigi nian sanktan lingvon al la studentoj, kies fakoj estas diversaj 24 lingvoj. Por pli efektive propagandi nian lingvon oni volas kolekti leterojn el diversaj terĝlobo-partoj kaj disdoni ilin al studentoj, kiuj volas interamikigi en Esperanto aŭ en iu el la jenaj lingvoj: angla, araba, cina, germana, hispana, franca, hinda,

indonezia, japana, persa, malaja, portugala, rusa, sveda, svahila, taja, turka, jugoslava, hungara, rumana, ĉeĥa, pola, itala kaj vjetnama. Adreso: Esperanto Klubo Kolombo HANKUK Universitato por Fremdaj Studoj C. P. O. Kesto 4258, Seoul 100 Respubliko de Koreio.

67-jara fakulo okupiĝas pri tridimensia fotografado de naturaj orkiĉeoj kaj papilioj. Li interesigas ankaŭ pri la historio kaj folkloro ĉirkaŭ la mielabeloj de ĉiuj landoj. Li korespondas nur kun veraj fakuloj pri tiuj temoj. Adreso: Anton Blickman, Palamedesstraat 17, 2026 VV Haarlem, Nederlando.

Speleologoj estas serĉataj! Ekde la 23-a ĝis la 25-a de oktobro 87 okazis en Jánská-ŝalo jam la 2-a SPELEOTENDARO. La arangon okazigis E-Klubo en Liptovský Mikuláš kunlabore kun tiea grupo de Slovaka Speleologia Societo.

La partoprenintoj el Ĉeĥoslovakio kaj Hungario krom vizitoj de fama Groto de Páco kaj aliaj karstaj vidindaĵoj ankaŭ pritraktis venontan kunlaboron. Evidentigis, ke ankaŭ sur tiel speciala kampo kiel estas la speleologio, oni povas utile eluzi la internacian lingvon. La plej gravaj taskoj por nuna agado estigis krom kreo de faka terminaro ankaŭ plibonigo de informado inter speleologoj pri Esperanto, Esperanta movado kaj ĝiaj nunaj eblecoj.

Interesatoj pri pli detalaj informoj aŭ pri la ĉi-jara SPELEOTENDARO (okazonta en septembro 1988), eventualaj kunlaborantoj aŭ interesigantoj pri Esperanto+speleologio turnu sin al adreso: Esperantský klub pri Muzeu Janko Králá, nám. Svobody 31, 031 01 Liptovský Mikuláš. (K. Ryšánek)

Klub esperantistů ZO ČES Třebíč hledá správce a uklízečku na sezonu od 2. 5. do 30. 9. Nejlépe důchodce, příp. manželský pár, pokud možno mobilní. Finanční otázky a ostatní podrobnosti podá Esperanto, 674 01 Třebíč.

ZE SEKRETARIÁTU

VÝPŮJČNÍ ŘÁD MG. SLUŽBY ČES

1. ČES zřizuje vypůjční magnetofonovou službu, která má sloužit hlavně k obohacení činnosti MS ČES.
2. Ve vypůjční službě se nepůjčují kazety, ale pořizují se nahrávky. Na kazetu, kterou si objednavatel pošle vedoucímu mg. služby.
3. Poplatek za nahrání je 20,- Kčs a slouží k nákupu dalších kazet. K platbám se používají pětidílné složenky ČES, které jsou k dispozici u každého kroužku. Individuální členové si mohou tuto složenku vyžádat na sekretariátě ČES. Zájemce zaplatí složenkou určenou částku a pátý díl spolu s objednávkou zašle vedoucímu mg. služby.
4. Na složenku je nutno uvést variabilní symbol 789. 10.
5. Zájemci o nahrávky se upozorňují, že u mg. služby jsou k dispozici kazety šedesáti i devadesátiminutové. Minutáž je vyznačena v seznamu. V objednávce je nutné ji nepřehlédnout.
6. Mg. služba může natáčet i na magnetofonové kotouče. V tom případě musí objednavatel uvést místo kam program přesně natočit a požadovanou rychlost /rychlost 4, 9 nebo 19/.
7. Pokud chce objednavatel natočit na jeden magnetofonový kotouč např. tři kazety - platí poplatek za tři kazety - tedy 60,- Kčs.
8. Kdokoliv poskytne mg. službě ČES originální nahrávku, obdrží za to bezplatně nahrávku jinou - dle svého výběru.
9. ČES rozešle každý rok všem MS ČES a vedoucím sekcí a komisí ČES seznam nahrávek mg. služby. Přírůstky nebo změny budou zveřejněny ve Startu a v Informacích, které vydává sekretariát ČES.
10. Služeb mg. vypůjční služby může využít každý esperantista v ČSSR, člen ČES nebo SEZ. V objednávce je nutno uvést členské číslo ČES nebo SEZ. Slovenský esperantský svaz bude informován o přírůstcích a změnách stejně jako místní skupiny ČES.
11. Zájemci o nahrávky posílejte svoje objednávky na adresu:
Josef Filip, Nédraží ČSD 146, 768 11 Chropyně.

Vedoucí mg. služby
Josef Filip

Vedoucí Komise pro tisk
a informace
Karel Kýr

Byl ustaven ČESKOSLOVENSKÝ ESPERANTSKÝ VÝBOR /ČSEV/, jakožto koordinační výbor pro spolupráci Českého esperantského svazu /ČES/ a Slovenského esperantského svazu /SEZ/. Jeho esperantský název je Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato /ĈSEK/.

Je konzultativním orgánem Českého esperantského svazu a Slovenského esperantského svazu. Doporučení ČSEV podléhají schválení ústředními orgány obou svazů.

Do výboru ČES a SEZ jmenují po třech zástupcích - členech předsednictva.

Zasedání ČSEV se budou konat minimálně dvakrát ročně, a to střídavě v ČSR a SSR.

Místo konání určí pořádací svaz, který jmenuje předsedu výboru pro dané zasedání. Dosavadní dohody o vztazích mezi ČES a SEZ /resp. ZESSR/ se ke dni vzniku ČSEV ruší.

ČSEV zahajuje svoji činnost dnem ustavující schůze, konané dne 27. 9. 1987 v Popradě.

Cílem ČSEV je koordinace činnosti v rámci esperantského hnutí na celém území ČSSR.

Dokument o ustavení ČSEV v Popradě dne 27. 9. 1987 podepsali za ČES: Ing. Petr Chrdle, Karel Franc a Ing. Vlastimil Kočvara, za SEZ: Ing. Milan Zvara, Dr. Elemír Erby a Ing. Vladimír Němec. (Podle Informací ČES 3/87)

- - - -

Komise pro tisk a informace ČES vyhodnotila za období květen-září 1987 za nejlepšího přispěvatele o esperantu v českém tisku MVDr. Františka Rytíře z Tábora. Dr. Rytíř nejen v tomto roce, ale i v letech předcházejících pravidelně vede v Tábořském zpravodaji rubriku o esperantu. Jeho články jsou vysoce odborně fundované a nemalou mírou přispěly a přispívají k rozšiřování a popularizaci esperanta v Jihočeském kraji.

V Praze 18. 12. 1987

Vedoucí Komise pro tisk a informace
Karel Kýr

- - - -

Atentigo de la redaktoro.

En la n-ro 5/87 de Starto troviĝas kelkaj eraroj, kiujn bv. korekti. Sur la pg. 15 la titolo de la artikolo devas esti ĝuste: Kiom valoras la radioelsendoj por esperantistoj. Sur la pg. 20 bv. forstreki la kvarlinian komencon de artikolo: Esperantologio en la nacia lingvo.

En la n-ro 6/87 sur la pg. 5 elfalis mencio, ke la artikolo Maĉarský ministr o esperantu estis prenita el Bulteno de Esperantista Klubo en Brno. Sur la pg. 17 bv. dividi malsuprajn 19 liniojn disde la supra teksto; la malsupra parto komenciganta per vortoj "Esperanto-movado;" estas daŭrigo de la "Tria rezolucio" sur la 16-a pg. Sur la paĝo 22 bv. korekti jenajn erarojn: en la dua alineo sur la 10-a linio la komenciganta frazo devas esti: En ĉiuj kazoj temas pri vortaj aŭ parolaj konfliktoj. Sur la 12-a linio devas esti: Klacado estas kalumniado... En la tria alineo sur la 6-a linio dufoje aperis malĝusta vorto "literaturo"; ĝuste devas esti "literaro". Ni petas la legantojn kaj la aŭtorojn pri pardono.

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 PRAHO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Karel Franc, Jiří Hanousek (grafika arango), Miroslav Malovec, Jiří Patera (respondeca redaktoro) kaj Helena Štruncová. Presas OKP-6 Liberec. Transdonita al presejo 1988-02-29. Jarabono 36 CSK, por eksterlando 48 CSK aŭ 14 NLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turnu sin al niaj perantoj, al UEA au rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Karel Franc, Jiří Hanousek (grafická úprava), Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redaktor) a Helena Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18.3.1985. Tiskne OKP-6 Liberec. Předáno do tisku 29.2.1988. Dohlédačí pošta Praha 07. Snižovaný poplatek za poštovné povolen Ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6.4.1979.

KRISTNASKA VESPERO EN PRAGO

1 La kluba prezidantino H. Štruncová ĉe la kristnaska arbeto.

3 Ankaŭ la junularo ludis kaj kantis.

2 Per akordeono amuzis nin s-ano s-ano Vich.

4 En la programo kontribuis ankaŭ la plej etaj esperantistinoj.



**Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979